

990  
1.10.1913

ESPERANTO FONDAJO & BANCOPOLITIKO

# OFICIALA KONGRESA GAZETO

N-o 2

Aldono al ESPERANTO

25 Aŭgusto 1913

REDAKCIA LETERKESTO EN LA AKCEPTEJO

*La Kongresa Gazeto aperas ĉiutage dum la Kongresoj  
kaj kostas 10 centimojn po Numero*

## OKAZONTAĴOJ

## Mardo 26 aŭgusto

- 8 h. 30 Fakaj kunsidoj en la Universitato (Lingva Komitato, Studentoj, Junuloj, Bontemplanoj).
- 9 h. Funebra meso en memoro de *Abato Richardson*, en la preĝejo Trinitatis (Taubenstrasse).
- 10 h. 15 **Unua Labora Kunsido de UEA** en la Kazino, 1<sup>a</sup> etaĝo, ĉambro 2.

## Tagordo:

- Raporto pri la agado de UEA. Rap. 1<sup>a</sup>. (H. Hodler.)  
Financa raporto. Raporto 2<sup>a</sup>. (Ed. Stettler.)
- 3 h. **Unua ĝenerala Labora Kunsido** en la Kazino, ĉambro 2. (Ne ankoraŭ fiksita tagordo.)
- 5 h. 15 Fakaj kunsidoj en la Universitato (liberpensuloj, kristanoj, kuracistoj, inĝenieroj, arĥitekturistoj).
- 6 h. Internacia ligo por etiko kaj kulturo.
- 8 h. 1/4 Teatra prezentado de „*Patreco*“ kaj „*Ginevra*“ en Varietea Teatro, Hirschengraben. (De mardo matene biletoj estos disvendataj al ne-Esperantista publiko; do Kongresanoj tuj rezervu siajn lokojn en la Akceptejo. Biletoj de 1 ĝis 5 frankoj.)

## OKAZINTAĴOJ

## KONGRESO DE ESPERANTO

## La malferma kunsido

Meze de nepriskribebla entuziasmo D-ro Zamenhof, sekvata de la organiza Komitato, de la konstanta Komitato de la Kongresoj kaj de la naciaj delegitoj, eniras la podiumon de la belega kaj vasta salonego de la Kazino. Ĝis nun malmultaj kongresejoj estis tiel lukse konstruitaj, ke oni kvazaŭ ne bezonis ilin plionami per okazaj dekoraciaĵoj. Tuj, akompanata de la orgeno, kiun majstre ludas S-ro orgeninspektoro Locher, eksonas la himno Espero, kiun ĉiuj Kongresanoj ĥore kantas. La impresado estas ĉiam grandioza kiel kutime, sed precipe impresiga por tiuj, kiuj unuafoje ĉeestas nian jaran internacian manifestadon.

Post longaj aklamoj G-lo Sébert, prezidanto de l'K. K. K., pro foresto de S-ro D-ro Mikolajski, malfermas la kunsidon. G-lo Sébert proponas elekton de jena kongresa estraro: Prezidanto: S-ro J. Schmid; vicprezidantoj: S-roj de Saussure kaj Ed. Stettler; ĝenerala sekretario: S-ro G. Chavet. La K. K. K. estis intencinta proponi kiel prezidanton S-ro de Saussure; sed tiu pro sia sanstato devis lasi tiun taskon al alia persono elektota de la Kongreso. Plie, naciaj vicprezidantoj estas: Kolonelo Robinson (Britujo), S-ro Rollet de l'Isle (Francujo), D-ro Arnhold (Germanujo). Tiu estraro estas aklame akceptita.

S-ro Chavet, ĉiam agema, komunikas salutojn al la Kongreso. El ilia amaso ni povas memori nur la jenajn, kiujn ni citas laŭ ordo de ricevo: 2-a tutruslanda Esperantista Kongreso en Kiew, Esperanta junularo en Wien, Bohema nacia konsilantaro en Praha, prof-ro Otto Simon, Rumanaj Esperantistoj, kiuj ne povas partopreni pro fradmortiga milito kaj skribas: „Vivu la paco inter la popoloj!“ Nederlanda katolika Esperantistaro, prelato Al. Giesswein, kiu ĉeestas la grandan Pakkongreson en den Haag, Bavara instituto de Esperanto, markizo de Spaletti, prezidanto de Hispana Ruĝa Kruco, S-ro Bruchs el Bolivio, F-ino Schäffer, S-ro Takahaŝin el Japanujo, grupo de Omsk, komerca Esperanta klubo de Melbourne, telegramo subskribita de dek ses Esperantistoj en Bjelostok, 2-a Hungarlanda Kongreso de Esperanto, Asocio de poŝtistinoj en Wien, samideanoj el Kraków, S-ro Rosenstock, S-ro Rudnicki, samideanoj el Finnlando, redakcio de Pola Esperantisto, S-ro Grabowski, kiu sendis versajon, kaj multaj aliaj.

Poste S-ro Chavet konigas la liston de la oficialaj senditoj de l'ŝtatoj aŭ de gravaj internaciaj entreprenoj:

## Delegitoj de Regnoj, publikaj Administracioj kaj Internaciaj Asocioj

## Aŭstrio

Iniciata Sindikato de Bohemujo en Praha: Pitlik.  
Komerca ĉambro de Reichenberg: Wilhelm Heller.

## Costa-Rica

La Regno: Locher, ĝenerala Konsulo en Bern.

## Germanujo

Politeknika Supera Lernejo en Coethen: Rektoro D-ro Foehr.

## Hispanujo

La reĝo de Hispanujo komisiis Kapitanon Perogordo por ĉeesti la Kongreson.

Ministro de Progresado, ĝenerala direkcio de komerco, industrio kaj laboro: D-ro Ratael de San Millan.

Hispana Ruĝa Kruco: Kapitano Perogordo.

Centro aŭtonomia de komerco kaj industrio de Barcelono: Anglada.

### Svisujo

Ŝtatkonsilantaro de la Kantono de Bern: S-ro Emil Lohner, direktoro de la publika instruado de la kantono.

Burĝestraro de Bern: S-ro von Biren-von Salis.

### Usono

Ŝtato Massachusetts: Pastro Horace Dutton.

„ Maine: Herbert Harris.

„ Pensylvania: Lewis B. Luders.

### Asocioj

Tutmonda Unio por Kristana Celado: Pastro Horace Dutton.

Internacia Ordeno de la Bontemplanoj: Tamke.

Internacia Asocio por la fondo de Mondlingva Oficejo: Rollier, vicprezidanto.

Kristanaj Junulaj Asocioj: Em. Sautter.

Internacia Oficejo de la Eldonistoj: Alfred Melly.

Tiam la honora prezidanto de l'Kongreso, S-ro kolonelo E. Frey, eks-prezidanto de la Svisa Federacio kaj direktoro de la Internacia Oficejo de la Telegrafoj, ekstaras; lia bela vizaĝo profunde impresas la ĉeestantaron, kaj inter ĝenerala atento li parolas en germana lingvo. Li malfermas kongreson kaj bonvenigas la Esperantistojn en la lando, „kies neŭtrala teritorio jam ofte estis la scenejo de gravegaj internaciaj traktadoj kaj decidoj“. Li memorigas la Duan en Genève sub honora prezido de la eminenta filozofo Ernest Naville, kiu diris: „De antaŭ multaj jaroj mi estas konvinkita, ke internacia lingvo estas la natura, la *necesa* rezultato de la civilizado kaj precipe de la ĉiam kreskanta piumultiĝo de transport-rimedo. Por homoj, kiuj pliproksimiĝas ĉiutage unu al la alia, pli grave estas ĉiutage trovi interkomprenilon.“ Kaj S-ro Frey mem aldonas: „Tiu aserto por mi estas same firma kiel geometria aksiomo.“

„Krei kaj vivi internacian lingvon signifas fari al la homaro nemezureblan servon, servon, kies gravecon nur tiu povas esti, kiu konas la murojn starigitajn inter la popoloj per la diverseco de lingvoj. Int. lingvo konstruos pontojn super tiu fosajo kaj ebligas al la anoj de diversaj lingvoj kaj gentoj la interŝanĝadon de siaj ideoj kaj la atingon de la plej alta celo akirebla en la granda familio de popoloj la *toleremo*. La toleremo en la vivo de l'popoloj signifas la finon de malpaco kaj malamo kaj estas la unua paŝo — ne por la forigo de la nacia ideo — sed por la interfratiĝo kaj reciproka amo.“

Tiu bela parolado, poste tradukita de F-ino Häberli, estas tre aplaudata pro la altaj sentoj, kiujn ĝi montras, kaj pro la eminenta personeco de S-ro Frey.

S-ro Kistler, reprezentanto de la registaro de l'Kantono Bern, deziras bonvenon al la Esperantistoj en la lando de libereco.

Nun reeksonas la orgeno, mallaŭte, grize, kvazaŭ en nebulo; montriĝas amaso ŝanceliĝanta, en kiu disaj homoj sin serĉas; sed kiam ili sin renkontas, ili ne interkompreniĝas, kaj pro tio eksplodas bruego de barakto kaj milito; dia fulmotondro aŭ homa kanonbruo surdigas, kaj el tiu konfuzo oni aŭdetas ĝemojn de l'malŝelita homaro; sed anĝela voĉeto nun aŭdigas la lastajn sonojn de l'Espero; timeme, sed obstine tiu voĉo pliaŭtiĝas, kaj fine en gloro jen estas la triumfa apoteozo de l'paca homama sento, kiu nun regos la tutan teron. Sed vortoj ne sufiĉas inde priskribi la belegcon, la ravan artecon de tiu orgena improvizado de l'majstro Karl Locher, orgeninspektoro.

S-ro Rollier salutas la Kongreson je la nomo de la kontoro por la alpreno de internacia lingvo kaj rekonas la gravecon de Esperanto.

S-ro rektoro Boirac, prezidanto de la Esperantista Akademio, devas plenumi sanktan kaj malĝojigan devon, li elvokas la memoron de l'mortintaj kunbatalantoj. D-ro P-ro

Dor, la amiko de l'malriĉuloj en Lyon, kiu estis antaŭ tri-dek jaroj rektoro precize de la Bern'a Universitato, mond-fama okulisto, nin forlasis preskaŭ tuj post la Kraków'a Kongreso, kiun li ne povis ĉeesti malgraŭ lia deziro ĉiam helpi T.E.K.A. Sed ŝajnas, ke la morto prokrastis ĝis lasta momento siajn frapojn por fari ilin pli kruele. De Ladevèze, tiu franco el Marseille, kiu ludis tiel gravan rolon por la propagando en Germanlando kaj precipe en Hamburg, kie li loĝis; se li malaperis, tamen lia bonega verko „Demandaro“ restos. Carlo Bourlet estis varbita al Esperanto en 1900 de P-ro Ch. Méray de la Dijon'a Universitato, kaj de tiam ne estas eble kalkuli liajn servojn al nia afero; ni perdis plej energian propagandiston, kiu inter aliaj sukcesis favorigi al nia movado la potencon Turing-Klubon de Franclando kaj la firmon Hachette. La lasta, kiun kovris tero antaŭ tri tagoj, estas Abato Richardson, kiu estis sin tute doninta al la Esperanta movado inter katolikoj kaj kiu preparis la baldaŭnan kongreson en Roma; dank'al li, malgraŭ lia malĝojiga foresto, tiu kongreso sukcesos post kelkaj tagoj.

S-ro Schmid proponas, ke la ĉeestantaro solene levigu por funebre honori tiujn mortintojn; emocio tiam regas en ĉiuj koroj.

S-ro P-ro de Saussure faras sian solenan paroladon ofte aplaudatan, kiun ni aparte publikigos.

Poste sekvas longa vico de la alparoladoj de diverslingvaj naciaj delegitoj:

### Naciaj Delegitoj

#### Aŭstrio-Hungarujo

Germana lingvo: D-ro Albert Engler.

Itala lingvo: D-ro Ghez.

Hungarujo: S-ro Vaniček.

#### Belgujo

F-ino Maria Posenauer.

#### Bulgarujo

Ivan Krestanov.

#### Britujo

Kolonelo J. Pollen.

Skotlando: W. Ross.

Irlando: D-ro Jameson Johnston.

Kimrujo: Jack Edwards.

#### Danujo

J. Lunbach.

#### Finnlando

K. von Frenckell.

#### Franco

Profesoro Raoul Bricard; Sergeant.

#### Germanujo

Profesoro Ledermann; D-ro Mybs.

#### Gibraltaro

Kolonelo Pollen.

#### Hispanujo

Kapitano Perogordo; D-ro de San Millan.

Kataluna lingvo: Alfonso Sabadell.

#### Italujo

Pier Carlo Monti, Attilio Vaona.

#### Nederlando

Vermaas.

#### Portugalujo

Rodolfo Horner.

#### Rusujo

D-ro Andreo Fišer, S. Obruĉev.

#### Svedujo

Teodor Rosengren.

#### Aŭstralio

F-ino Sinotte.

#### Oceanio

Malajaj Ŝtatoj: Ariffin.

Nun dum streĉita atento de ĉiuj kongresanoj, S-ro Generalo Sébert, ano de la Franca Instituto, ekstaras, kaj je la nomo de l' tutmonda Esperantistaro diras ĝian senfinan dankemon kaj admiron al S-ro D-ro Zamenhof pro lia majstra verko. Li transdonas al la prezidanto de la Kongreso, S-ro Schmid, oran medalon, kiu prezentas unuflanke la bildon de tiu, kiu ne volas esti Majstro kaj aliflanke artan simbolon de Esperanto. Tiu medalo estas elpensita de S-ro de Saussure, laŭ la spesmila sistemo; similajn arĝentajn povos aĉeti ĉiuj Kongresanoj. S-ro Schmid sendas belan Svisinon nacie vestitan por donacprezenti al la Majstro tiun ĉefverkon. La staranta ĉeestantaro entuziasme aplaŭdas kaj ovacias la kreinton de la sola reala kaj praktika helpa lingvo. Dume alia Svisino prezentas al tre afabla S-ino Zamenhof belan bukedon da ruĝaj rozoj surhavantan svissfederacian blankan krucon ĉel edelvejsoj.

Post diversaj komunikoj de la ĝenerala sekretario, S-ro Schmid fermas la kunsidon, kaj dum la eliro S-ro Locher lastfojon sonigas sian orgenon.

L. P.

### Marŝado de la Kongresanoj

Dimanĉon, je la sesa amasiĝas sur la Herrengasse antaŭ la Kazino ĉirkaŭ la naciaj flagoj la mil Kongresanoj. Dank al agemo de l' Komisionanoj ordo baldaŭ regas, kaj sekvante la urbmuzikistaron, kiu ludas gajajn marŝariojn, la tuta Kongresanaro ekiras tra la Marktgasse kaj la Spitalgasse ĝis la stacidomo kaj de tie tra la Christoffelgasse, preter la monumento al la Universala Poŝta Unio, tra la Bundesgasse ĝis antaŭ la Federacia Palaco. Multaj Kongresanoj portas verdajn flagojn. La stratoj estas superplenaj je Bernaj kaj fremdaj rigardantoj, kiuj tre interesiĝas. Sed kiam la sekvantaro alvenas sur la Bundesplatz, la rigardantoj estas tiel multegaj, ke oni devas iom atendi aŭtaŭ ol grupiĝi. Tiam la urbmuzikistaro solene ludas la svisan nacian himnon; ĉiuj kapoj senĉapeliĝas, kaj ĉiuj, nepre ĉiuj, kantas tiun himnon al libereco. Kaj nun tra la Amthausgasse reekmarŝas la Kongresanaro ĝis la Kazino. Tie, sur vasta balkono, S-ino kaj D-ro L. L. Zamenhof, ĉirkaŭitaj de la estradaj eminentuloj, kiuj intertempe trinkis teon. La sekvantaro helike amasiĝas kaj haltas antaŭ la balkono. Post ovacio al la kreinto de Esperanto, la Kongresanoj ĥore kantas la Esperon akompanatan de la urbmuzikistaro. Dum tiu kantado, la vidaĵo, el la balkono, de la placo tute nigra je homoj estis tre impresiga.

### Elektra lumigo de la Katedralo

Dimanĉon vespere je la 9-a, la Katedralo estis tre bele lumigata per elektro dank'al la Bern'a Societo por la Fremduloj. Tiu lumigo tre efike reliefigis la admirindan gotikan konstruaĵon.

### Diservoj

Tri diservoj okazis dimanĉon matene; la hebrea en la Sinagogo kun prediko de S-ro Rabeno Saphra; la protestanta en la preĝejo Heiliggeist kun prediko de S-ro Pastro Rust; la katolika en la preĝejo Trinitatis kun prediko de S-ro Abato Raici, el Buda-Pest.

## MALFERMA PAROLADO

de

S-ro R. DE SAUSSURE

*Kara Majstro, Doktoro Zamenhof,  
Estimata honora Prezidanto kaj Oficialaj Delegitoj,  
Estimataj kongresanoj,*

Lastan jaron, ĉe la 8-a universala Kongreso de Esperanto en Krakovo, D-ro Zamenhof en sia oficiala parolado faris al la Esperantistaro deklaron tute ne atenditan:

„Konsciante — li diris — ke, ĝis sia plena fortikiĝo, nia afero bezonas ian enkorpigitan standardon, mi — laŭ via deziro — dum 25 jaroj plenumadis tiun rolon, kiel mi povis, kaj mi permesadis, kvankam tre nevolonte, ke vi vidu en mi ĉefon kaj Majstron. Sed nun permesu al mi, ke mi fine formetu de mi tiun rolon. La nuna kongreso estas la lasta, en kiu vi vidas min antaŭ vi; poste, se mi povos veni al vi, vi ĉiam vidos min nur *inter* vi.“

Kaj inter la diversaj kaŭzoj, aluditaj de D-ro Zamenhof, por klarigi sian decidon, li diris interalie:

„Nun, kiam nia afero estas jam sufiĉe forta, estas necese, ke ĝi fine fariĝu absolute libera, ne nur libera de ĉiuj personaj *dekretoj*, kia ĝi fariĝis jam antaŭ 25 jaroj, sed ankaŭ de ĉiu efektiva aŭ ŝajna persona *influo*. Estas necese, ke la mondo sciigu tute klare, ke Esperanto povas havi aŭ ne havi siajn elektitajn gvidantojn, sed ke ĝi posedas nenian konstantan *Majstron*.“

Fininte sian paroladon, D-ro Zamenhof kredis, ke li povas tiam tute simple forkuri de la publika scenejo, ofenda por lia modesteco, kaj sin kaŝi inter la multnombraj kongresanoj; kaj efektive li forlasis la oficialan podiumon, kie sidas kutime la kongresestraro kaj malaperis en la popolon Esperantistan. Tiel surprizitaj estis la kongresanoj, ke ili eĉ faris nenian provon, reteni perforte la Majstron sur la podiumo.

Sed nun pasis preskaŭ unu jaro, kaj pripensinte la aferon, multaj Esperantistoj, se ne ĉiuj, venis al la konkludo, ke, kiel ajn doloriga estas por ili la decido de nia Majstro, ĝi tamen estas decido grandanima, kaj bonefikonta sur la estontecon de nia movado. D-ro Zamenhof, kvankam li ĉiam portas okulvitrojn, estas homo tute ne miopa, kaj la demandon pri lingvo internacia li juĝas de punkto tre alta kaj foren videbliganta. Li komprenas, ke la homa vivdaŭro estas tempo tre mallonga kompare kun la tempo postulita, por plene efektiviĝi la realigon de lingvo internacia. Jam dum 25 jaroj li fervore kaj senlace direktadis la movadon Esperantistan tra ĉiuj malhelpoj kaj kontraŭventoj: la infano „Esperanto“ estas nun plenkreska, kaj alvenis la tempo, kiam ĝi *devas* sin disigi de la patro, por konkeri la mondon per siaj propraj fortoj. Certe tiu momento estas doloriga por la filo, kaj ankaŭ — mi kredas — por la patro; sed por ambaŭ ĝi estas esperplena matenruĝo de komencanta nova periodo.

Tamen, kvankam ni ne volas kontraŭstari al la decido de D-ro Zamenhof pro tio, ke li juĝas ĝin oportuna, utila kaj eĉ necesa por la movado Esperantista, kvankam ni ne povas malhelpi, ke li jam lastan jaron demetis sian oficialan rolon, ni almenaŭ ne volas permesi al nia majstro, ke li forlasu sian oficon tiel nerimarkite, kvazaŭ nenio grava estus okazinta. Pro tio, kara Majstro, permesu nun al mi, esprimi al vi *oficiale* la profundan dankon, admiron kaj amsenton de la tuta Esperantistaro, ne nur por via genia verko, sed precipe ankaŭ por la nova sento, aperinta en la mondon antaŭ 25 jaroj kaj nun enkorpigita en Via modesta persono.

La Organiza Komitato decidis solenigi la transiron de la unua al la dua periodo de nia historio per la stampigo de memoriga ora medalo, kiun nia kolego S-ro Jakob Schmid oficiale prezentos hodiaŭ al D-ro Zamenhof, je la nomo de la tuta kongresanaro kaj sendube ankaŭ kun la aprobo de la tuta Esperantistaro.

La unua periodo de la Esperantista historio forpasis: vivu la dua! Ĝi estu la decida periodo, dum kiu Esperanto enradikiĝos pli forte en la tuta mondo! Vivu la IX-a Kongreso kaj vivu Zamenhof!

Mi estus dezirinta en tiu parolado, fari resumon de la verko de Zamenhof kaj de la historio de Esperanto dum la lastaj 25 jaroj; sed la limigita tempo, kium mi disponas, ne permesas tion; mi devas lasi tiun taskon al pli kom-

petentaj personoj, des pli, ke dum tiu-ĉi jaro aperis en la esperanta literaturo bonaj historioj de Esperanto, kies legadon mi rekomendas al ĉiuj.

Mi volas nur diri al nia Majstro, ke, kvankam la tempo de lia oficiala rolo estas nun pasinta, ni ne ĉesos vidi en li la amatan simbolon de Esperanto, kaj la samideanoj sincere esperas, de dum ankoraŭ multaj jaroj ili havos la ĝojon vidi lin inter si.

(*Daurigota.*)

## GINEVRA

En tiu originala Esperanta teatraĵo S-ro Edmond Privat prezentas la personojn de la malnova Kelto-Kimra legendo pri reĝo Arturo kaj la kavaliroj de la Ronda Tablo. La reĝo Arturo estas altanima, mistike idealista monarko, kiu plenumas nur sian altan popolkondukantan rolon. Nek en siaj zorgoj, nek en sia alta idealo li partoprenigas sian edzinon, la belan reĝinon Ginevra. Tio suferigas sian noblan koron kaj senteman animon. Franca kavaliro Lancelot amas la reĝinon kaj ricevas de ŝi nur tute ĉastan amon, ĉar ŝi deziras resti fidela al respektata kaj grandanima edzo. Ŝi eĉ postulis de Lancelot, ke li longe forrestu de ŝi, sed la reĝo mallerte sendas Lancelot por distri la reĝinon unu tagon kiam ŝi desiris diskuti kun li pri reĝaj aferoj. Spionema princo Modredo deziras krei skandalon, kalumnie perfidas la ĉastajn geamantojn parolante al la reĝo Arturo kaj aranĝas dramon kaptilon por surprizi Lancelot kaj la reĝinon dum tute honesta renkontiĝo en la reĝina ĉambro.

Krom ĉefa poezia kaj literatura valoro por nia lingvo, la dramo entenas delikatan psikologian observon pri danĝera kulpulo de idealiste egoista granda viro, kiu maljuste ignoras la altan valoron de virina kunlaboro por socia bono.

Kvankam la dramo entute plene akordiĝas kun tempo, moroj kaj poezieco de tiu malnova legenda epoko, la aŭtoro sukcesis enmeti ankaŭ aktualan kaj ĉiutempan homan intereson.

Ni ne dubas, ke la konataj geaktorj de la Reĝa Flandra Teatro, kiujn ni jam aplaudis en Antverpeno, donos per sia talento meritatan sukceson al tiu nova verko de nia ŝatata kunlaboranto Edmond Privat, kaj artan ĝuon al ĉiuj kongresanoj.

A. R.

## „PATRECO“

Ni renkontis S-inon M. Wolf, la tre ŝatindan aŭtorinon de l'vivdramo „Patrec“, kaj ni al ŝi demandis, kiun celon ŝi volis atingi per sia verko. Tre afable ŝi bonvolis respondi:

„Patrec estas la rezulto de meditado kaj kompatoj; medito pri tro ofte okazanta fakto, kompatoj al la malfeliĉa junulino trompita kaj forlasita, kompatoj al la senhelpa infaneto. Estas verŝajne tiu kompatoj, kiun oni sentas tra la tuta verko, kiu sukcesigis la francajn prezentadojn.“

Ni do esperas, ke ĉiuj kongresanoj ĉeestos kaj aplaudos tiun dramon, kaj antaŭ ol foriri el Bern akiros ĉe la Esperantia Librejo la libron, kiu estos por ili altvalora memorajo.

L. P.

## Tra la kongreso

∴ Nelacigebla propagandistino, jam de ĉiuj bone bonata, estas F-ino Gérard, Konsulino de UEA en Paris. Ŝi kuraĝe alprenis novan taskon: ŝi reklamas por la X<sup>a</sup> Kongreso en Paris, kaj disdonas aliĝilojn, kaj kolektas enskribiĝojn. Aliĝo kostas 15 frankojn, kaj 14 estos redonataj, se ĉeesto de l' Kongreso ne estos ebla. Nur aliĝintoj ricevos de januaro

1914 la ĉiumonatan specialan gazeton de l' Kongreso. Se, nekredeble, iu ne konas ŝin, oni povos facile rekonu F-inon Gérard: malhelverda robo kun nigraj punktoj, blanka ĉapelo kun blua ruĝa rubandeto (Paris'aj koloroj).

∴ La Akceptejo estas malfermita de la 8-a 1/2 matene ĝis la 6-a 1/2 vespere.

∴ La Kongresa poŝtoficejo estas malfermita de la 8-a matene ĝis la 7-a vespere.

∴ La Vendejo estas malfermita matene de la 8-a 1/2 ĝis la 12-a kaj posttagmeze de la 2-a ĝis la 6-a.

∴ London, merkredon kaj vendredon vespere je la 8-a 1/2 en la katedralo okazos belegaj orgenaj koncertoj; enirpago: 1 franko. La orgeno, konstruita en 1849, havas 65 voĉojn.

## Tra la mondo

*New-York.* — Oni trovis sub la ĉambro de urbestro S-ro Gaynot, en City Hall, kvin kartoĉojn de dinamito, kiuj estus povintaj eksplodigi la tutan domon.

*Washington.* — Prezidanto Wilson mem sin prezentos antaŭ la Deputitaron kaj la Senaton por legi la proklamon pri la meksikaj aferoj. Li klarigos, kion Usono faris por restarigi la pacon.

*Cagliari.* — Sardenjaj arbaroj brulas.

*Londono.* — Brulado okazis en la petroltenejoj de la Standard Oil.

*Berlin.* — Princino Friedrich-Wilhelm naskis filinon.

*Parizo.* — Generalo de Négrier mortis sur la ŝipo *Reĝo-Herold* dum vojaĝo al Spitzberg.

*Pola.* — Vic-admiralo grafo Lanjus mortis pro vundoj post la pafakcidento.

*Saint-Tropez.* — Okazis la entombigo de Emile Ollivier.

*Hago.* — La ferma kunveno de la Pac-Kongreso okazis sabaton. La Kongreso kunvenos en Vieno dum 1914 kaj en San Francisko dum 1915. La Kongreso decidis sendi telegramon al la prezidanto de Usono por danki lin pri lia sintenado kontraŭ pacifistoj. Ĝi akceptis rezolucion por peti, ke la Usona registaro ne konstruu fortikojn sur la Panama kanalo.

## UNIVERSALA ESPERANTIA LIBREJO

(En la Kazino)

# Kongresa Teatraĵo GINEVRA

de

EDMOND PRIVAT

Prezo: Fr. 1. 25

## OFICIALA

**KONGRESA GAZETO**

N-o 3

Aldono al ESPERANTO

26 Aŭgusto 1913

REDAKCIA LETERKESTO EN LA AKCEPTEJO

*La Kongresa Gazeto aperas ĉiutage dum la Kongresoj  
kaj kostas 10 centimojn po Numero*

## OKAZONTAĴOJ

**Merkredo 27 aŭgusto**

- 8 h. 30 Fakaj Kunsidoj en la Universitato (Sciencasocio, fizikistoj, kemiistoj, ruĝkrucaj, socialistoj, E. L. A.).
- 10 h. 15 **2-a Labora Kunsido de UEA** en la Kazino (ĉambro 2, 1-a etaĝo). Ĉiuj Kongresanoj rajtas ĉeesti, sed nur Esperantianoj voĉdoni.
- Tagordo:*
- Financa raporto. Rap. 2-a (Ed. Stettler).  
Raporto pri la Interŝanĝa Fakoj. Rap. 3-a (M. Lévy).  
Raporto pri la Studenta Fakoj. Rap. 4-a (J. Mareš).  
UEA kaj ne-Esperantistoj. Rap. 5-a (R. Perez).  
Pri Esperanto diplomoj. Rap. 6-a (Th. Rousseau).
- 12 h. 15 Oficiala festeno en la Kazino (3 frankoj; antaŭmendu biletojn).
- 3 h. *(tre precize)* Fotografado de la tuta Kongresanaro sur la piedpilkludejo, malantaŭ la Historia Muzeo, trans la ponto Kirchenfeld.
- 3 h. <sup>1</sup>/<sub>2</sub> **2-a Ĝenerala Labora Kunsido** en la Kazino (ĉambro 2), (Ne jam fiksita tagordo).
- 5 h. <sup>1</sup>/<sub>4</sub> Fakaj kunvenoj en la Universitato (teozofoj, juristoj, instruistoj, progresemuloj, ekzamenoj de la Internacia Instituto de Esperanto).
- 8 h. <sup>1</sup>/<sub>4</sub> Granda Koncerto de la Bern'a Virĥoro, Kvarteto kaj Solistoj, en la Kazina Ĉambrego.

## OKAZINTAĴOJ

**KONGRESO DE UEA****Solena malferma kunsido**

Ĝi okazis lundon vespere je la 3-a en vasta ĉambrego de l'Kazino. De unu jaro, la Komitato de UEA meritis nur unu riproĉon, nome ke ĝi elektis por tiu grava kaj interesega manifestado tro malvastan ĉambron: ne kvincent personoj povis eniri, kaj multaj devis staradi, kaj ĉiuj suferetis pro varmo. Sed tiu riproĉo ne estas tute meritita, ĉar la elekto de la ĉambro estis bazita sur antaŭaj spertoj en

Antwerpen kaj en Kraków, kie vere tro malmultaj personoj ĉeestis. Sed hieraŭ estis plene triumfa sukceso, kiu plej trafte pruvis la nepran interesegon, kiun ĉiuj Esperantistoj, eĉ ne Esperantianoj, havas por nia jam kvinjara tutmonda Asocio.

La tre ŝatata Prezidanto de UEA, S-ro H. B. Mudie nun vojaĝas, kaj ne por plezuro, en Kanado. Do S-ro Rousseau, Vic-Prezidanto de UEA, lin anstataŭis kaj mem prezidos la tutan Kongreson de UEA.

Sur la estrado ĉeestas, ĉirkaŭ S-ro Rousseau, S-roj Generalo Sébert, Hodler, Stettler, Privat, Schmid, Rollet de l'Isle, Arnhold, Kolonelo Pollen, von Frenckell, Luders kaj aliaj.

Estis ne atendita kaj agrabla surprizo, kiam bonega opera orĥestro eksonigis, sub direkto de l' majstro Herrmann, la Uverturon de la Edziĝo de Figaro (Mozart). Cetere, inter la paroladoj, sekvis aliaj muzikaj: Valso Laura (Milöcher), Geedziĝa Marŝo (Mendelsohn), Largo (Haendel).

S-ro Rousseau malfermas la 4-an Kongreson de UEA, kaj transdoninte diversajn salutojn, li faris antaŭ la tre atentema publiko sian malferman paroladon, en kiu oni retrovis la precizemon, kiu lin karakterizas. Tiu parolado, kiu havis grandan sukceson, aperos aparte en nia Kongresa Gazeto „Esperanto“.

S-ro Rousseau donas la parolrajton al S-ro kolonelo Pollen, kiu legas la tekston de la parolado de S-ro H. B. Mudie, prezidanto de UEA. Spritajn vortojn li aldonas, kaj laŭ aklame akceptita propono de S-ro Rousseau, la 4-a Kongreso decidas sendi al S-ro Mudie salutan kaj dankan leteron.

S-ro Schmid, komitatano de UEA kaj prezidanto de la Organiza Komitato de l'Bern'aj Kongresoj, salutas la Kongreson kaj deziras bonvenon al la kongresanoj. Kiel prilaborinto de tiu grava kaj feliĉa decido, li memorigas, en kiaj kondiĉoj okazis la antaŭaj Kongresoj de UEA, kaj montras la profiton de la nova aranĝo aplikata unuafoje al tiu Kongreso, nome la opa kotizajo (al la Universala kaj al la Esperantia), kiu ne nur ŝparigas al la kongresanoj, sed ankaŭ donas al ili la eblon ĉeesti la kunvenojn de UEA kaj konatiĝi kun agado de nia Asocio.

S-ro Hodler, la tiel admire kompetenta direktoro de la C. O. de UEA (right man in the right place), tiam faras sian tre dokumentitan paroladon: „Kiel nun staras UEA?“ Montrinte la rezultatojn de l'grava ŝanĝo en la statutoj, nome de la plialtigo de la kotizajo, malgraŭ kiu restis fidelaj preskaŭ 6000 anoj, li dankas al ĉiuj kunpenintoj, sed precipe al la modestaj delegitoj de UEA, kiuj ŝparis nek tempon nek klopodojn por konservi la plej grandan parton de la

antaŭaj membroj (9000). Li citas la 40 delegitojn, kiuj nun varbis pli ol 20 anoj kondiĉe, ke tiuj estu almenaŭ la du trionoj de la antaŭa jaro. S-ro Hodler, bazinte sian diron sur la sperto, insistas precipe pri la neceso de la individua varbado, kiu ĉiam liveris kaj liveros pli gravajn rezultatojn ol la ĝenerala tro universala propagando. Ni laboru internacie, sed ĉiu laboru individue. Tiuj tre pravaj ideoj estas tre favore akceptataj, kaj ĉiuj ĉeestantoj montras per siaj varmaj aplaŭdoj, ke li pravege parolis. Ni poste aperigos en la gazeto „Esperanto“ la tutan tekston de tiu parolado, en kiu ĉiuj Esperantistoj kaj Esperantianoj plezure retrovos la metotan karakteron de nia dankinda direktoro kaj ricevos utilajn instruojn.

Laŭ propono de S-ro Rousseau unuanimaj varmegaj danĉoj estas voĉdonitaj al la Direktoro kaj al la Vic-Direktoro de la C. O. de U. E. A.

Nun, nia malnova juna beletristikulo, la eminenta oratoro S-ro Privat komencas sian festan literaturan paroladon: „*La nuna tasko de Esperantismo*“. Rave, ĉarme, entuziasmege li parolas; la vortoj fluas, la frazoj flugas, kaj la ideoj svarmas. Analizi tiun paroladon estas simple nebla tasko. Cetere, kiel kutime, S-ro Privat parolas kvazaŭ senpreparite; dum la parolado de S-ro Hodler li notis kelkajn vortetojn sur papereton, kaj tio sufiĉis. Sed nun ni ĉiuj petas S-ran Privat (ĉu ni devos postuli?), ke li, atable kiel ĉiam, bonvolu revoki siajn memorajojn kaj verki skribe sian nepri-skribeblan paroladon, kiun ni plezure aperigos en nia Kongresa Gazeto. Tion deziras ĉiuj kiuj ĉeestis, ĉiuj kiuj staris premataj ekster la ĉambro, ĉiuj kiuj kontraŭvole ne povis veturi al Bern. S-ro Edmond Privat, ĉu vi rifuzos? Ne, ĉar ĉarma S-ino Privat kunigos sian peton al la nia, kaj ni sukcesos. Karaj legantoj, do zorge ellegu nian gazeton, en kiu baldaŭ estos presita la festa parolado de la plej elokventa kaj talenta paroladisto inter la Esperantistoj. Ĉu necese diri, ke entuziasmaj aklamoj salutis la finon de tiu parolado?

Post diversaj komunikoj de S-roj Rousseau kaj Stettler, grava deziresprimo estas unuanime, unukore, akceptata; nome ke de nun en ĉiu Universala Kongreso de Esperanto ununura sola kotizaĵo valoru ankaŭ por la Kongreso de UEA por ke tiel ĉiuj povu ĉeesti la instruajn kunvenojn de nia Asocio. Je la 5-a 1/2, S-ro Rousseau fermas la kunsidon. L. P.

## KONGRESO DE ESPERANTO

### Fakaj Kunsidoj.

*Kuracistoj.* — (TEKA). London je la 8-a 1/2 en la Universitato, kunsidis 25 TEKA-anoj sub prezido de S-ro D-ro P-ro Jameson Johnston, prezidanto de TEKA; oficis kiel protokolisto S-ro D-ro Christen. La prezidanto emocie kaj emociige elvokis la memoron de l' mortintoj, kaj precipe de respektegata D-ro P-ro Dor, prezidinto de TEKA, kiu antaŭ 30 jaroj estis rektoro de la Bern'a Universitato. Post legado de l'raportoj de la prezidanto, de la sekretario kaj de la redakcia sekretario de „Kuracisto“, tiu kunveno, pure administra, unuanime voĉdonis honoran membrecon al S-roj D-roj Forel kaj Mybs. Sciencaj kunsidoj okazos mardon vespere kaj sabaton matene. J. J.

*Socialistoj.* — London matene okazis en la Universitato la 1-a kunveno de la Esperantistaj socialistoj, kun ĉeesto de sesdek personoj, sub prezido de S-ro Hermant, internacia sekretario, helpata de S-ro Couteaux, protokolisto, unuanime elektitaj. Post parolado de la prezidanto, sekvis salutoj de anoj el diversaj nacioj: S-ro Tesch (Frankfurt), S-ro Jost

(Zürich), D-ro Schulhof (Bohemujo), S-ro Cimr (Aŭstrio), S-ro Gouchon (Lyon), F-ino Fryer (London), S-ro Richter (Leipzig), S-ro Goodliffe (Letchworth), k. a. Oni decidis tuj prepari por la Bern'anoj grandan publikan propagandkunvenon, kiu okazos jaŭdon vespere kun partopreno de kelkaj plej konataj socialistoj en Bern. Paroladoj en Esperanto de ĉiunaciaj socialistoj estos tradukataj germanen. J. C.

*Instruistoj.* — En la Universitato kunvenis ĉirkaŭe 50 geinstruistoj reprezentantaj 15 naciojn diverslingvajn entute. Bedaŭrinde forestis la eminenta Prezidanto de I. I. A., P-ro Cart. Tial devis malfermi la kunsidon S-ro Jacob, el Antwerpen, sekretario-kasisto. Li unue petis bedaŭregan funebtron stariĝon del'ĉeestantoj pro la morto de nia tiel atestiminda Abato Richardson. Poste li raportis pri la financa stato, kaj oni povis konstati la sindonon kaj ĝustemon de nia sekretario kaj ke oni povas lin fidi por konduko de nia afero en sukcesa vojo. S-ro Giraud je l' nomo de S-ro Aizière, franca prezidanto, raportis pri agado de l' franca societo instruista kaj faris merkredon diskutotan proponon pri federaciigo de l' naciaj esperantaj instruistaj societoj. Alinaciaj delegitoj ankaŭ iom parolis pri sialanda agado. S-ro Jacob gratulis forestantajn kolegojn Danajn kaj Saksajn, kiuj fondis nacian societon, kaj fine lin gratulis la tuta kunvenantaro pro lia senlaca kaj akurata laboro. Venonta kaj lasta kunveno okazos merkredon je la 5-a vespere samloke. Tagordo: 1° Elekto de duono el la estraro. 2° Internacia Federacio. — A. G.

(Kongresa Gazeto raportas nur pri Fakaj Kunsidoj, kies sekretarioj sendis mallongan raporton. Leterkesto de l' Redakcio en la Akceptejo.)

## Tra la kongreso

∴ Arta portreto de mortinta D-ro P-ro Dor, eks-rektoro de la Bern'a Universitato, mondfama okulkuracisto, prezidinto de TEKA, estas ekspoziciata en la Kazino. Tiu heliogravuraĵo estas aĉetebla ĉe la Vendejo de S-ino A. Farges, direktorino de Lyon'a Esperanto-Oficejo.

∴ S-ro Cotton, profesoro ĉe la Supera Normala Lernejo (Paris), ĵus ordenita Kavaliro de l' Honora Legio, alvenis kun sia juna edzino.

∴ La Kongresanoj bonvolu senprokraste aĉeti biletojn por la Oficiala Festeno (Fr. 3) kaj por la Ekskurso al Interlaken (Fr. 10).

∴ S-ino Edmond Privat, antaŭe malsaneta, tamen alvenis en Bern.

∴ Enterigo de Abato Richardson okazis lundon en Bossey (apud Genève).

∴ Alvenis hieraŭ en Bern S-ro Colas, ĝenerala sekretario de la katolikaj Esperantistoj, kiu nun lastpreparos la vojaĝon al Roma.

∴ Multaj leteroj alvenis por Kongresanoj en la Poŝtan Oficejon de l' Kongreso (Kazino, teretaĝo, ĉefa enirejo).

## MALFERMA PAROLADO

de

S-ro R. DE SAUSSURE

(Sekvo.)

Kaj nun komencas nova periodo. Ne malantaŭen, sed antaŭen ni devas rigardi, ĉar ankoraŭ malfacila estas la vojo kaj granda estas la laboro.

Kiel junulo, adiaŭante la patron hejmerestantan, ni devas starigi la programon de nia nova vivo kaj ĝin organizi laŭ

niaj fortoj kaj vivrimedoj; ni devas ekzameni, kiamaniere ni devas anstataŭigi la oficialan rolon de D-ro Zamenhof, kaj kiamaniere ni povas kompletigi la nunajn instituciojn de Esperanto kaj de la Esperanta movado.

1-e. En niaj universalaj kongresoj *la malferman paroladon devas fari de nun la kongresprezidanto*. Tiu propono kompreneble ne venas de mi, kiu estas en malbona situacio, por ĝin fari; ĝi venas de Prof. Boirac, prezidanto de nia Akademio. D-ro Zamenhof unue proponis, ke S-ro Boirac faru la kutiman malferman paroladon anstataŭ li. Sed S-ro Boirac ne volis akcepti. Tion ni ĉiuj povas bedaŭri, ĉar li certe estus parolinta pli elokvente kaj pli kompetente ol mi; tamen mi opinias, ke li agis saĝe kaj por la bono de nia movado, ĉar povus esti malutile kaj eĉ danĝere, elekti iun el la Esperantistoj, eĉ la plej eminentan, kiel kvazaŭ heredonton aŭ posteulon de Zamenhof. „Se mi parolus tiun-ĉi jaron kiel prezidanto de la Akademio, skribis S-ro Boirac, — mi devus paroli ankaŭ proksiman jaron ĉe la X<sup>a</sup> kongreso kaj ĉe la XI<sup>a</sup> kaj ĉe la XII<sup>a</sup>, k. t. p. Mi do opinias, ke multe pli logike kaj konvene estus, se tuj de nun la malferma parolado de niaj kongresoj estus farata de la Kongresprezidanto, kiel tio okazas en ĉiuj aliaj kongresoj internaciaj.“ Kaj S-ro Boirac aldonis, ke tio estis ankaŭ la opinio de la Konstanta Komitato de la Kongresoj (K. K. K.). Mi ne dubas, ke tiu propono estos favore akceptata de la Esperantistaro, ĉar per ĝi ni ne nur evitas la riproĉon, ke ni elektis novan kvazaŭreĝon anstataŭ Zamenhof, sed ni ankaŭ donas al nia nova organizo karakteron vere demokratikan kaj bazitan sur egaleco de rajtoj por ĉiuj popoloj.

Se kelkaj malamikoj niaj malbonintence pretendis, ke la Esperantistoj havas reĝon, tion ili nun ne plu povos diri, ĉar laŭ la nova reĝimo Esperantistujo fariĝas respubliko vere demokrata. Tamen unu rimarkon mi deziras fari: la elekto de la Kongresprezidanto, kiel ĉefatoro de la solena malferma kunsido estas certe tre taŭga, ĉar tiamaniere ĉiu nacio, unu post alia, havos la okazon esprimi siajn proprajn dezirojn koncerne la movadon Esperantistan, sed plej necese estas, ke la kongresprezidanto estu sole respondebla pri tio, kion li diras. Bonvolu do, mi petas konsideri mian nunan paroladon, kiel nuran esprimon de personaj opinioj, des pli, ke mi disponis tre mallongan tempon, por ĝin prepari.

2-e. Koncerne *la elekton de la ĉiujara prezidanto*: ĝis nun laŭ la regularo de kongresprezidanto estis elektata de la kongreso mem, post propono de la KKK, kaj tio signifas, ke la prezidanto estas elektita je la lasta momento: tiamaniere li ne havas la tempon, zorge prepari la tekston de la malferma parolado. Ni do esperu, ke iam kongreso ekzamenos tiun demandon kaj trovos por ĝi taŭgan solvon.

3-e. Koncerne *la Lingvan Komitaton kaj Akademion*, la decido de D-ro Zamenhof alportas en tiujn instituciojn nenian senteblan ŝanĝon. Ili estas, kiel antaŭe, nia supera kaj sola lingva aŭtoritato. La sola ŝanĝo alportata de la nova stato de aferoj estas eble la pli grandigo de la morala aŭtoritato de la Akademio kaj de la Lingva Komitato. Sed nun, ĉar ni devas organizi nian movadon sendepende de D-ro Zamenhof, ni devas konsideri la Lingvan Komitaton kaj la Akademion kiel la solajn lingvajn aŭtoritatojn.

4-e. Koncerne *la internacian organizadon de la Esperanta movado*, la nuna momento estas plej oportuna por definitive solvi tiun gravan kaj malfacilan demandon, kiu de kelkaj jaroj estas vigle diskutita kaj parte solvita per la kreado de Administra Komitato de la Centra Oficejo kaj de „rajtigataj delegitoj“. Sed ekzistas ankoraŭ malfacilaĵoj, precipe pri la maniero kolekti la monon, necesan por subteni la centrajn instituciojn. Ĉar tiu demando, pri internacia organizado, kaŭzis multajn diskutojn pli — malpli akrajn,

permesu al mi esprimi pri tiu temo kelkajn personajn opiniojn:

La ĉefa diferenco inter la Esperantista popolo kaj alia popolo politike organizita estas, ke ĝi ne havas kaj neniam povos havi ĝendarmojn, kaj sen ĝendarmoj oni ne povas *devigi* ĉiun apartan Esperantiston, aŭ ĉiun apartan Esperantistan grupon al obeo de leĝoj.

Efektive laŭ la Bulonja deklaro:

„Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiu celo li ĝin uzas. Apartenado al iu aktiva Societo Esperantista por ĉiu Esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga.“

Laŭ tiu teksto oni vidas: unuflanke, ke Esperanto estas lingvo kaj nur lingvo; aliflanke, ke krom la lingvo Esperanto ekzistas ankaŭ Esperantista *movado*, subtenata de Societoj. El tiuj societoj ĉiu havas sian specialan organizon, specialan celon, k. t. p.; ĉiu societo estas pli aŭ malpli grava laŭ la nombro de siaj anoj, sed ĉiu societo reprezentas nur la tutecon de siaj anoj kaj neniam la tutecon de la Esperantistaro.

Do la internacia organizado de la Esperantista movado estas kaj povas esti nenio alia ol la kreado de tutmonda societo aŭ Asocio Esperantista, kaj, laŭ la Bulonja deklaro, la aliĝo al tiu nova asocio aŭ societo estas por ĉiu Esperantisto „rekomendinda“, sed ne „deviga“.

Nu, kial ĝis nun oni ne klare komprenis la veran karakteron de nia ĵus fondita internacia organizado. Laŭ mi, estas nur pro tio, ke oni forĝis doni difinitan nomon al la nova tutmonda Asocio, ĉar la manko de difinita nomo kreas konstante konfuzojn. Kiam oni parolas pri „oficialaj institucioj“, „rajtigataj delegitoj“, „centra oficejo“, k. t. p., oni povas sin demandi, al kiu rilatas tiu oficialeco, aŭ rajtigiteco, ĉar, se Esperanto estas nur lingvo, la esprimo „oficiala institucio de Esperanto“ povas nur signifi „institucion pure lingvan“, kiel ekzemple la Franca Akademio por la Franca lingvo. Sed se oni donus nomon al nia internacia organizado, nomante ĝin ekzemple „Internacia Asocio Esperantista“, tiam neniu plu povus plendi pri la senco de la vortoj „rajtigata“, k. t. p., ĉar tiuj vortoj rilatas al la „Internacia Asocio Esperantista“ (IAE): *rajtigata delegito* signifus „rajtigata delegito de IAE“, „centra oficejo“ estus „centra oficejo de IAE“, tute same, kiel la internacia oficejo de la Telegrafoj en Bern estas nomata „centra oficejo de UUT“ (Universala Unio Telegrafa). Tiel la situacio fariĝus pli klara kaj sendube preskaŭ ĉiuj grupoj kaj societoj por propagando de Esperanto aliĝus propravole al la tutmonda Asocio. Tiuj grupoj, kiuj ne volus aliĝi al „IAE“, ne povus plu plendi, ke ili ne havas „rajtigatajn delegitojn“ ĉe la universalaj kongresoj, ĉar la „rajtigataj delegitoj“ estus ne delegitoj de Esperanto aŭ de la Esperantistaro, sed delegitoj de „IAE“.

(Daŭrigota.)

## Letero de S-ro Bolingbroke Mudie al la Kongreso de U.E.A.

Karaj Esperantianoj,

Vere estas malĝojo por mi interrompi mian ĉeeston ĉe la brilanta serio da Kongresoj, kiuj kronas nian ĉiujaran laboradon, sed cirkonstancoj devigis min iri al Kanado, kaj la fakto, ke mi portos la verdan stelon en novan rondon da tre bone konataj personoj en tiu nova mondo, devas iomete konsoli vin se vi bedaŭras mian foreston. Sed pri kelkaj punktoj mi estas tute trankvila.

Unue pri la prezidanteco. Mia bonega kolego Rousseau plene montris sian kompetentecon, gvidi juste kaj laŭregule

la diskutojn pri nia multfaka temaro. Mi havas plenan konfidon, ke en li vi ĉiuj trovos tre kompetentan anstataŭanton en la prezidanta seĝo.

Revuante la progreson de la antaŭa jaro, mi trovas ĝin tre kontentiga. Malgraŭ la duoblo de la kotizajo, ni hodiaŭ havas pli ol 6000 membrojn, kies fervoro ŝajne konstante kreskas, kaj dank'al la energiĝemaj klopodoj de nia financministro kaj al la sindonema subteno de internaciaj kunlaborantoj, nia antaŭa bedaŭrinda financa situacio definitive pliboniĝis. Por tio plej koraj dankoj.

Ju pli mi identiĝas kun la esperanta movado, des pli mi konvinkiĝas pri ĝiaj rimarkindaj kvalitoj, kaj mi konscias pri la fakto, ke nepre post nur iom pli da klopodoj, la mondo subite ekvekiĝos kaj laŭte krios: Jen, la lingvo, kiun ni jam de longe serĉadis! Ĉiuj antaŭsignoj montras tian baldaŭan triumfon de nia lingvo.

En la brita ĉefurbo, Londono, ni havas la plezuron preskaŭ ĉiusemajne akcepti fervorajn samideanojn el diversaj landoj, kiuj kun miro raportas la ricevitaĵojn kaj la eliritan plezuron kaj profiton provizitan de nia movado. Por ĉio, plejparte, estas responda nia kara D-ro Zamenhof, sed eĉ lia laboro ne estus plene kronita sen la diligentaj klopodoj, la konstanta sindonemo kaj la modesta kunlaborado de la miloj da homamantoj, kiujn mi estas fiera rekoni kiel Esperantianoj.

Ke vi elektis min prezidanto de tiu ĉi grava kaj vasta asocio, mi jam du-tri foje dankis vin, kaj mi kaptas la nunan okazon ripeti la grandan honoron, kiun vi faris ne nur al mi persone, sed al mia lando, elektinte min via prezidanto, sed kiel antaŭe, mi denove esprimas mian pretecon, tuj ekŝiĝi kiam aliaj pli kompetentaj, pli fervoraj partianoj de nia afero prezentos sin.

La energiaj komitatanoj de nia asocio, kun kiuj mi ĝojas diri, ke mi ĉiam restas en la plej koraj interrilatoj, povus diri al vi, ke mi opinias, ke la tre ofta ŝanĝo de altaj oficiroj kondukas al la plivigliĝo de societo, kaj se vi sampensas kun mi en tiu ĉi rilato, estu tute certa, ke mi neniel ofendiĝos en iu elekto, kiun vi deziras rekomendi.

Pri la ĉefaj demandoj, kiuj staras antaŭ ni por konsidero troviĝas unue la demando pri nia venonta kongresejo. Sufiĉe ofte ni esprimis la opinion, ke la intereso de la movado postulas, ke la kongreso tutmonda kaj nia kongreso okazu en la sama urbo, eĉ malgraŭ la fakto, ke la disponebla tempo restas tre malmulta. Mi devas konfesi, ke la plej agrabla kongreso, kiun la UEA iam ĝuis estis tiu ĉe Augsburg, kie la laboro farita estis multoble pli granda ol tiu de aliaj, sed Augsburg estis nia unua kongreso, kaj tion ni devas ne forgesi. Mi esperas, ke oni povos trovi rimedojn por kongresi en Parizo dum la granda kongreso, kiu estos ĉeestata de mi ne scias kiom da samideanoj. Mi ankaŭ esperas, ke oni povos trovi manieron, por fari kontentigajn aranĝojn por ambaŭ kongresoj. Ke la tempo alvenis kiam unu kotizajo por la du kongresoj estos efektivebla mi havas nenian dubon, sed certaj malfacilaĵoj sin prezentas, kiuj kredigas min, ke eble ni devos iom pli atendi antaŭ ol ricevi tiun ĉi idealon. Mi tamen esperas, ke vi, per via unuanima voĉdono, konfidos al via komitato, kaj faras rekomendon ke se eble Parizo estu kunveno por la venonta kongreso.

Kiel via reprezentanto mi ĉeestis kongreson en Bruselo, kie aliaj propagandistoj de internaciaj lingvoj sin prezentis. Kelkaj oficiale sin turnis al mi por peti, ke la UEA akceptu ne nur Esperanton, sed aliajn internaciajn lingvojn. Mi tuj respondis private, ĉar mi sciis, ke la tempo bezonata por komuniki tian postulon al komitato estas longa, kaj mi donis mian malĉan opinion pri la neebleco kaj nedezirindeco de tia propono. Mi havas nenian dubon, ke la komitato

estas unuanima pri tiu ĉi punkto, sed mi pensas, ke estus bone se vi ĉiuj unuanime substrekos paragrafon 3 de nia statuto, kiu difinas la oficialan lingvon de la UEA.

## Tra la mondo

*Berlin.* — La princo de Wales alvenis.

*Bilbao.* — La gereĝoj alvenis vendredon vespere.

*Düsseldorf.* — La subdirektoro de grava banko forkuris kun 250.000 frankoj.

*Hago.* — La reĝino komisiis S-ron Cort van der Linden por formi ministaron.

*London.* — Sep mil personoj ĉeestis dimanĉe imponantan mitingon ĉe Trafalgar Square, memore al Bebel.

*Lons-le-Saulnier.* — S-ro Pichon, franca ministro de fremdaj aferoj ĉeestis festenon de la Mutualeco kaj faris gravan paroladon pri la jusa rolo de Francando dum la lastaj okazintaĵoj.

*Madrid.* — Generalo Marina enŝipiĝis por veturi al Arzila, kie li konferencos kun generalo Sylvestre.

*Napoli.* — Sportulo Spognoletti havis gravan akcidenton en aŭtomobilo.

*New-York.* — Shaw dungis naŭ advokatojn. Policistoj en aŭtomobilo senĉese lin sekvas.

*Paris.* — Ĉiuj francaj gazetoj longe raportas pri la vivo de l'jus mortinta generalo de Négrier.

*Peterburgo.* — Franca misio, kondukita de generalo Joffre, forveturis.

*Port-Said.* — Krozŝipo Hamidié forveturis el Port-Said al Beyrouth kaj Konstantinopoli.

*Roma.* — Ĉefepiskopo de Skutari forveturis ne trafinte sian politikan celon.

*Roma.* — Grava popola kunveno okazis en Reggio por postuli la konstruon de kanalo Reggio-Modena-Mantua.

*Toledo.* — Ĉefepiskopo Aguirre, primato de Hispanlando, estas mortanta.

*Wien.* — La imperiestro donis al la itala generalo Caneva la plej altan ordenon de Sankta Stefano.

## Karavano de UEA tra Svisujo

Postkongresa vojaĝo tra Svislando estas organizata sub aŭspicioj de UEA kaj direktota de S-ro Poncet, Del. en Lyon. Ĝi forveturos el Bern lundon matene je la 8-a, kaj traveturos kaj vizitos: Thun, lago de Thun, Interlaken, lago de Brienz, Brienz, Meiringen, intermonto Brünnig, Sarnen, Alpnachstad, lago de la 4-Kantonoj, Vitznau, Rigi-Kulm (sunsubiĝo), Arth-Goldau, Luzern, lago de la 4-Kantonoj, kapelo de Tell, Axenstrasse, Flüelen, Rütli, Brunnen, Axenstein, Luzern, Zürich; ĝi revenos en Bern ĵaŭdon 4-an de septembro vespere. Oni povos aliĝi nur por la 2 aŭ la 3 unuaj tagoj, aŭ poste viziti Sankt-Gallen, Konstanz kaj la lago (Bodensee), Schaffhausen, Basel kaj Neuchâtel, aŭ tra la tunelo Gotthard veturi al Italando. Nur Esperantianoj estos akceptataj; detala programo kun prezoj aperos morgaŭ en Kongresa Gazeto „Esperanto“.

**NE FORGESU  
VIZITI LA VENDEJON.**



## OFICIALA

**KONGRESA GAZETO**

N-o 4

Aldono al ESPERANTO

27 Aŭgusto 1913

REDAKCIA LETERKESTO EN LA AKCEPTEJO

*La Kongresa Gazeto aperas ĉiutage dum la Kongresoj  
kaj kostas 10 centimojn po Numero*

Kongresa Gazeto ne aperos la tagon de la Ekskurso  
al Interlaken.

## OKAZONTAĴOJ

**Ĵaŭdo 28 aŭgusto**

Ekskurso al Interlaken. Rendevuo de la Kongresanoj antaŭ la 8-a matene en la ĉefstacidomo (en la bileteja halo). Biletoj antaŭe aĉetotaj po 10 frankoj (fervojo, vaporŝipo, tagmanĝo, vespermanĝo).

En okazo de malbela vetero, la ekskurso okazos vendredon kaj la vendreda programo efektiviĝos ĵaŭdon.

**Vendredo 29 aŭgusto.**

- 8 h. <sup>1</sup>/<sub>2</sub> Fakaj Kunsidoj en la Universitato (studentoj, junuloj, liberpensuloj, vegetaruloj, fervojistoj, ELA).
- 10 h. <sup>1</sup>/<sub>4</sub> **3-a Labora Kunsido de UEA** en la Kazino (ĉambro 2, 1-a etaĝo). Ĉiuj Kongresanoj rajtas ĉeesti, sed nur Esperantianoj voĉdoni.

*Tagordo:*

- UEA kaj ne-Esperantistoj. Rap. 5-a (R. Perez).  
Pri Esperanto-diplomoj. Rap. 6-a (Bord-Rousseau).  
UEA kaj ŝovinismo. Rap. 7-a (Th. Rousseau).  
Universala poŝtmarko. Rap. 8-a (A. Behrendt).  
Loko de la venonta Kongreso.  
Diversaĵoj.
- 2 h. Kunveno de ĉiuj Francaj Esperantistoj por priparoli la X<sup>m</sup> Kongreson en Paris, en la Kazino, ĉambro 2.
- 3 h. Ĝenerala kunsido de la Scienca Asocio Esp. (por la tuta Kongreso), en la Kazino, ĉambro 2.
- 5 h. <sup>1</sup>/<sub>4</sub> Fakaj kunsidoj en la Universitato (poŝtistoj, abstinentuloj, *Ekzamenoj de la Internacia Instituto de Esperanto*).
- 6 h. Kunveno de bontemplanoj en la Bern'a loĝio (Kramgasse 45).
- 8 h. <sup>1</sup>/<sub>2</sub> Granda Balo Internacia en naciaj kostumoj, en la Kazino.

## OKAZINTAĴOJ

**KONGRESO DE ESPERANTO****Nepublika kunveno de Rajtigitaj Delegitoj**

Mardon matene oni sensukcese penis kunveni en aparta ĉambro la rajtigitajn delegitojn severe kontrolitajn.

Mardon posttagmeze je la 2-a sama kunveno kunigis ĉirkaŭ 100 rajtigitajn delegitojn sub prezido de S-ro G-lo Sébert. Ĝi estis kvazaŭ provripetado antaŭ la publika prezentado.

**1-a Ĝenerala Labora Kunsido**

Ĝi okazis mardon posttagmeze je la 3-a sub prezido de S-ro Stettler, vic-prezidanto de la Kongreso.

S-ro Chavet, ĝenerala sekretario, legas la protokolon de la solena malferma kunsido, kiu estas aprokata; li komunikas kelkajn telegramojn, inter kiuj tiu de S-ro Clarence Bicknell.

S-ro rektoro Boirac, prezidanto de la Lingva Komitato kaj de la Esperantista Akademio, legas sian raporton pri la Lingva Komitato. Li priparolas la laboron de: Sekcio pri vortaro (S-ro Cart, direktoro), komisiono pri komuna vortaro (S-ro Grosjean-Maupin, subdirektoro, anstataŭanta S-ro Léopold Elb), komisiono pri teknika vortaro (S-ro Vêrax, subdirektoro); sekcio pri gramatiko (S-ro Grabowski, direktoro); komisiono pri verkoj rekompencotaj (S-ro Cart, prezidanto); komisiono pri vortfarado (S-ro de Saussure); naciaj subkomitatoj. S-ro Boirac memorigas la rekomendon pri lingvaj eraroj en la esperantaj verkoj, rekomendon presitan de multaj esperantaj gazetoj, kiuj kelkafoje tre favore ĝin komentariis. S-ro Boirac konigas la nomojn de sep nove balotitaj anoj de la L. K.

Poste S-ro Boirac starigas tabelon de la ses ĉefaj devoj de bona L. K.-ano. Laŭ tiu leĝo, nur 3 anoj plenumis la ses devojn (laŭreatoj: F-ino Flourens, S-roj Boucon kaj Pujula); nur 10 plenumis ĉiujn devojn esceptante la 5-an; 103 anoj plenumis nur kelkajn el la ses devoj. Fine 26 anoj eĉ ne plenumis la unuan ĉefan devon.

S-ro G-lo Sébert verkis pri la K. K. K. raporton, kiun resumas S-ro Chavet. Tiu raporto unue temas pri sendo de multaj oficialaj publikigaĵoj, due klarigas pro kiuj cirkonstancoj la IX<sup>a</sup> ne povis okazi en Genova, kaj nun sidas en

la federacia urbo de Svislando. La oficialaj invitoj al la diversaj regnoj ne povis esti farataj, kiel de la aliaj naciaj registaroj ĉe la antaŭaj kongresoj; pro tio ne estas tiun jaron tiom da oficialaj ŝtatsenditoj. La raporto poste pri-traktas la organizon de la laboro de la rajtigitaj delegitoj kaj aludas la specialan nepublikan kunvenon de tiuj parlamentanoj. Fine ĝi jene fiksas la tagordon de la kongreso:

Elektado de la Estraro;

Diversaj salutparoloj;

Prezento de la Raporto de la Prezidanto de la Lingva Komitato;

Prezento de la Raporto de la Prezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongreso;

Prezento de la Raporto de la Prezidanto de la Administra Komitato;

Prezento de la Raporto de la Prezidanto de la Komisiono por ĝenerala organizado;

Propono pri ebla okazigo de niaj kongresoj, ĉiujn duan jaron;

Sidejo de la venontaj kongresoj.

Poste ankaŭ S-ro Chavet resumias la raporton de S-ro G-lo Sébert pri la Administra Komitato de la Centra Oficejo kaj pri tiu oficejo mem. Oni aŭdas pri la reorganizo de la Administra Komitato, pri la apartigo de la servoj de la C. O., pri la sekcio A kaj pri la Sekcio B, pri la budĝeto kaj pri la neceso de statistiko de Esperantistaj societoj, libroj, gazetoj, k. t. p., k. t. p., por kontroli la evoluon de nia movado.

Nun sekvas diskuto. Ni estas nun informataj, ke la rajtigitaj delegitoj en la privata kunsido proponis, ke en tiaj specialaj kunvenoj ili preparos decidojn por submeti al la tuta Kongresanaro.

S-ro von Freneckell klarigas la proponon: ĝi ne celas sekretan laboron, sed nur en malgranda rondo ekzameni la aferojn. Sekvas kelkaj oratoroj, kies nomon oni ne sufiĉe aŭdas kaj ideojn ne klare komprenas.

S-ro Sergeant, tre aŭdebla kaj aŭskultinda advokato, atengigas, ke en Antwerpen oni decidis igi publikaj ĉiujn kunvenojn de rajtigitaj delegitoj.

S-ro G-lo Sébert pretendas, ke en Antwerpen oni ne ĝuste komprenis la proponon. Barcelonano demandas ĉu la rajtigitaj delegitoj havas la rajton decidi. S-ro Epstein vigle kontraŭstaras la proponon kaj petas pli demokratian agmanieron. S-ro Boirac klarigas, ke estas utile, ke la rajtigitaj private konsiliĝu; sed ne ofte estos necese voĉdoni en tiu antaŭa kunveno, kiu estos nur prepara.

S-ro Stromboli, flame, fajre, vulkane, admonas, ke la proponita agmaniero estas vere stranga, nome: decidi, kaj poste diskuti. S-ro Bricard tamen deziras liberan kunvenrajton.

Fine estas alprenita la jena decido: la rajtigitaj delegitoj havu la rajton kunveni por ekzameni kaj diskuti, kaj voĉdoni preparajn voĉdonojn.

Ĉiuj ĉeestantoj admiris kaj laŭdis la senpartian kaj energian prezidon de S-ro Stettler. L. P.

### Fakaj Kunsidoj.

*Studentoj kaj junuloj.* — Mardon matene ĉeestis en la Universitato 30 personoj. Prez.: Krestanof (Bulgaro loĝanta en Dijon); vic-prez.: S-ino Henriët-Nolotte (Dijon); 1-a sek.: René-Charles Pichon (Paris); 2-a sek.: Pier Carlo Monti (Pavia). Krestanof legas leteron de Mareš (Luhaĉovice) kaj faras malferman paroladeton. Pichon legas salutleterojn. Sekvas salutparoloj de: F-ino Nozikova (Petersburg), Monti (Pavia), Kröber (Leipzig), Stejskal (Prahá), Pichon (Paris). Krestanof legas raporton de la fakestro de USEA, unuanime aprobatá. Monti legas raporton pri CF; sekvas

diskuto pri gazeto. Krestanof legas proponon de kongresintoj en Ithaca (Usono), laŭ kiu Esperanto estu uzata en la proksima Internacia Studenta Kongreso. S-ro Mahn (Breslau) parolas pri utileco de universitataj gvidlibroj kaj gvidfolioj en Esperanto. Proksima kunveno: vendredon 29-an je la 8 h. 1/2 matene en la Universitato. R. P.

*(Kongresa Gazeto raportas nur pri Fakaj Kunsidoj, kies sekretarioj sendis mallongan raporton. Leterkesto de l' Redakcio en la Akceptejo.)*

### Diservo.

La mardon 26<sup>m</sup> de Aŭgusto, je la 9<sup>a</sup> okazis ĉe la preĝejo „Trinitatis“ funebra Diservo je la honoro de Pastro Richardson, ĵus mortinta en Bossey (apud Genève), sur vojo al la 9<sup>a</sup> Kongreso. Multaj Esperantistoj ĉeestis, inter kiuj D-ro Zamenhof. Post la Diservo, S-ro Pastro Lajos predikis Esperante, kaj S-ro Colas rakontis la lastajn momentojn kaj la morton de nia malaperinta pioniro. K. E.

### Teatra prezentado.

Ĝi okazis mardon vespere de la 8 h. 1/2 ĝis post la 1 h. matene. Pro tiu malfrua horo ni ĝin raportos nur en proksima numero de Kongrese Gazeto.

## KONGRESO DE UEA

### Unua labora kunsido

La unua labora kunsido de UEA okazas mardon 26 aŭgusto je 10 h. 1/4. La protokolo de la festa malferma kunsido estas unuanime akceptita.

S-ro Hodler donas klarigojn pri la agado de UEA dum 1912—1913 (raporto 1-a).

S-ro Mahn (Breslau) je la punkto pri la Delegitoj rimarkigas ke okaze de la nunjara ekspozicio en Breslau li ricevis multajn informpetojn kaj petojn pri gvidlibroj al kiuj ne estis aldonitaj respondelspezoj. Li petas ke oni klopodu trovi rimedon por pagi sumojn pli malaltajn ol la valoro de respondkupono. Li plie proponas, ke oni klopodu por trovi signon, kiu permesos facile renkonti la trapasantajn esperantianojn ĉe la stacidomo.

S-ro Reber (Bamberg) proponas la enkondukon de abonoj al la gvidlibroj kaj gvidfolioj.

S-ro Epstein (Londono) raportas, ke li havas plendojn kontraŭ membroj, kiuj ne repagas la elspezojn de iuj servoj; li petas klarigon pri la maniero laŭ kiu estas farata la statistiko pri la turismaj servoj.

S-ro Hodler respondas, ke laŭstatute la delegitoj ne priatentu la informpetojn ne akompanatajn de la respondelspezoj kaj ke ili antaŭ ol fari servon petu la elspezojn. Rilate al statistiko malfacile estas starigi tre precize kie estas la limo de servoj; aliparte estas maloportune ŝanĝi la rubrikojn de la statistiko, ĉar necese estas, ke oni povu kompari la diversjarajn statistikojn.

Al la propono de S-ro Reber, S-ro Hodler respondas, ke abono al gvidfolioj jam fakte ekzistas, ĉar tiujn gvidfoliojn oni povas ricevi de la C. O. de UEA. Pri la gvidlibroj UEA nun kreas specialan servon por ilia dissendado al petantoj, sed por tio necese estas, ke la eldonistoj de gvidlibroj komprenu, ke tiaj eldonaĵoj, estantaj reklamiloj, devas esti kvazaŭ senpagaj. Li rekomendas, ke por la gvidlibroj oni uzu la mondformaton.

S-ro Mahn, je la punkto Hotelá Servo, komunikas ke al la hotelisto li donis libreton sur kiun la trapasantaj

Esperantianoj devas enskribi sian nomon; tiel statistiko estas facile farebla.

S-ro Hodler konsentas kaj opinias, ke utile estus se la venontan jaron UEA povus sendi senpage jarlibron al siaj hoteloj.

S-ro Stettler konigas la motivojn, kiuj estis lin instigintaj proponi la kreon de la Hotela Servo. Li rekomendas, ke la membroj vojaĝantaj ĉiam uzu tiujn hotelojn kaj komuniku siajn rimarkojn pri ili.

S-ro kolonelo Pollen esprimas al UEA sian dankon pro la helpo, kiun al la membroj alportis la kreo de la Hotela Servo. Li uzas la okazon por substreki la profiton, kiun ricevis de la delegitoj de UEA la karavano de Londono al Berno ĉe la diversaj halturboj.

S-ro Poensgen (Kaiserswerth) rekomendas la gvidlibron de Düsseldorf.

La prezidanto atentigas, ke pro manko de tempo oni sin okupu nur pri ĝeneralaj aferoj, sed ne pri tia aŭ alia aranĝo, kiu nur havas lokan intereson.

F-ino Moreau (Bruselo) proponis, ke en ĉiuj grandurboj UEA helpu je la starigo de hotelo por vojaĝantaj virinoj.

S-ro Stettler diras, ke la propono estas en si mem interesa, sed nun ne efektivebla. Plie anstataŭ mem entrepreni similajn aferojn, UEA prefere interligiĝu kun ekzistantaj societoj, kiuj jam bone plenumas sian laboron. Al tiaj societoj UEA helpu per sia lingvo kaj siaj servoj; interŝanĝe tiuj societoj helpos al ĝi.

S-ro Hodler, priparolinte la diversajn punktojn de sia raporto, konkludas insistante pri la neceseco varbi pluajn membrojn kaj etendiĝi ĉe la neesperantistaj rondoj; li aludas la bezonon de propagandisto-vojaĝisto, kiu vizitus la Delegitojn, konsilus ilin kaj propagandus UEA en la lokoj, kie ĝi estas ankoraŭ en neprospera stato. Li esperas, ke baldaŭ oni povos trovi la monrimedojn necesajn.

S-roj Reber kaj Tamke proponas al la deziresprimado aldonojn, kiuj estas akceptataj; poste la kongreso akceptas la tekston de la deziresprimado de raporto 1-a. La diskuto de la financa raporto estas prokrastata ĝis la venonta kunveno.

Je la 12 h. la kunveno estas fermita.

## Karavano de UEA tra Svisujo

Kiel ni ĝin hieraŭ konigis, Postkongresa Vojaĝo tra Svislando estas organizata sub aŭspicioj de UEA kaj sub direkto de S-ro L. Poncet, Del en Lyon. Jen ĝia programo:

*Lundon 1-a de septembro:* matene je la 8 h. el Berno, tra Thun, Spiez, Interlaken, lago de Brienz (per ŝipo), Brienz, Meiringen (tagmanĝo), intermonto Brünig (per dentradvagono), Sarnen, Alpnachstad, (per ŝipo ĝis:) Vitznau, (per dentradvagono ĝis:) je la 6 h.  $\frac{1}{2}$  al Rigi Kulm (sunsubiĝo, vespermanĝo, dormo).

*Mardon 2-an:* (sunbrigiĝo, matenmanĝo) matene je la 9 h.  $\frac{3}{4}$  el Rigi Kulm, tra Arth-Goldau, je la 12 h. al Luzern (tagmanĝo, vizito de la urbo, ĝardeno de l' glaciejoj, orgena koncerto en la ĉefpreĝejo, vespermanĝo, kursalo, dormo).

*Merkredon 3-an:* (matenmanĝo) matene je la 7 h.  $\frac{1}{2}$  el Luzern (per ŝipo) al Tellsplatte, (piede 4 km aŭ laŭvole ŝipe) al Flüelen je la 12 h. (tagmanĝo), je la 2 h.  $\frac{3}{4}$  el Flüelen (per ŝipo) al Brunnen, (per dentradvagono) al Axenstein, je la 4 h. 50 el Brunnen (per ŝipo) al Luzern je la 6 h.  $\frac{3}{4}$  (vespermanĝo, dormo).

*Ĵaudon 4-an:* (matenmanĝo) matene je la 9 h.  $\frac{1}{4}$  el Luzern, je la 10 h.  $\frac{1}{2}$  al Zürich (vizito de la urbo, tag-

manĝo, nacia historia muzeo), vespere je la 6 h.  $\frac{1}{4}$  el Zürich, je la 9 h. al Bern.

Oni povos aliĝi nur por la 2 aŭ la 3 unuaj tagoj, aŭ poste viziti Sankt-Gallen, Konstanz kaj la lagon (Bodensee), Schaffhausen, Basel kaj Neuchâtel, aŭ tra la tunelo Gotthard veturi al Itallando. Nur Esperantianoj estos akceptataj; prezoj aperos morgaŭ en Kongresa Gazeto „Esperanto“. La kondukonto de la karavano restos ĉiutage de la 5 h.  $\frac{1}{2}$  ĝis la 6 h.  $\frac{1}{2}$  en la ĉambro 4 (1<sup>a</sup> etaĝo de la Kazino, malantaŭ la Vendejo) por doni informojn kaj ricevi aliĝojn.

## Tra la kongreso

∴ Ĉiuj, kiuj iros Milanon estas nepre petataj averti skribe S-ron Cattorini, Via Sarpi, 60, Milano.

∴ *Kongreso de Katolikoj en Romo.* Ĉiuj Esperantistoj, kiuj decidas iri Romon ne ankoraŭ pagintaj la aliĝon al la Katolika Kongreso nur bezonos iri rekte al la hotelo de la Kongresanoj: *Hotelo Dinesen, via delle Fiamme, Roma*, tute proksime al la ĉefa stacio *dei Termini*, kie ili alvenos. — La Oficiala Komisiono de pilgrimoj en Romo, jam sciigis la Organizan Komitaton de la Kongreso pri certa aŭdienco de Lia Papa Moŝto.

∴ Mardon vespere la fama aviadisto Bider, kiu antaŭ du monatoj transflugis la Bern'ajn Alpoj, ĉirkaŭflugis la Kazinon kaj vekis viglan intereson.

∴ Ni estas informitaj, ke hodiaŭ duono de la Vendejo fariĝos kuirejo de la Esperantistaro pro la festeno.

∴ *Propagandistoj!* — La propagandmarkoj, kiujn vi gluas sur viajn kovertojn kaj poŝtkartojn, estas vidotaj nur de la adresatoj (kiuj, se ili estas Esperantistoj, jam ne plu bezonas esti varbitaj) kaj de la peruloj, t. e. de la poŝtistoj. Sed nun la poŝtistoj ja vidas tiom da ĉiuspecaj kaj ĉiucelaj sigelmajkoj, ke ili ne plu atentigas tiujn gravuraĵojn. Tamen jen rimedo: nova propagandmarko estas eldonita de S-ino Farges, direktorino de Lyon'a Esperanto-Oficejo. Tiuj markoj, eldonitaj jam en tri lingvoj (angla, franca, germana) montras ĉe la supra parto per dikaj por la rigardo tre logaj literoj la alvokan vorton: „*Poŝtistoj*“. Nu, estu certaj, ke tiam poŝtisto haltos en sia laboro, kiam li ekvidos tiun vorton, kaj li rigardos la simbolan artgravuraĵon (per Esperanto kaj per poŝto kaj telegrafo, la komerco plimultigas kaj plivastigas siajn eksterajn rilatojn) kaj li scivole legos la malsupran tekston, maldike presitan: „*Lernu la Helpan Internacian Lingvon Esperanto*.“ Jen bonega propagandilo malkara (100 markoj kostas 1.50) aĉetebla en la vendejo ĉe la Kazino.

## Letero de S-ro Bolingbroke Mudie al la Kongreso de UEA

(Fino.)

Mi fine devas aludi al nia eminenta kunbatalinto, pri kies morto ni ĉiuj hodiaŭ funebras. Mi jam verkis tiun ĉi paroladon antaŭ ol mi ricevis la malgajigan sciigon pri la morto de Carlo Bourlet.

Mi ĉeestis la enterigon kaj metis florkronon de laŭroj sur lian ĉerkon, kiel signon de admiro por la multaj venkoj, kiujn li helpis akiri por ni. Lia memoro estu por ni kuraĝigilo kaj instigu nin al pluaj venkoj. En li nia afero perdis unu el siaj plej kompetentaj kunbatalantoj, kaj mi perdis amitan amikon.

Al viaj laboroj en la daŭro de nia kongreso, mi deziras tre grandan sukceson, kaj mi konkludas denove bedaŭrante, ke mi ne havos la plezuron persone premi al vi la manon. Tiu fakto, tamen, neniel kredigu vin, ke mia intereso pri nia movado ekvelkas. Demandu miajn intimajn amikojn, eĉ gepatrojn, kaj ili certigos al vi, ke mi estas pli freneza ol iam antaŭe batalante por nia kara afero. Sed mi ne povas konkludi sen vorto de dankoj kaj gratulo al miaj laboremaj kolegoj, speciale S-ro Hodler, kies kompetenta mano vere direktas nian asocion sur ĝia bona vojo, al S-ro Stettler, kies financaj kapabloj estas jam sufiĉe konataj, al S-ro Rousseau, kiu, post tiu ĉi kongreso akiros eĉ pli varman lokon en viaj koroj, kaj al ĉiuj komitatanoj, delegitoj kaj konsuloj, kaj eĉ al ĉiu modesta membro de la UEA, kies diligenta laboro jam provizis rimarkindan monumenton pri la praktika rezultato de internacia kunlaboro sen iaj malhelpoj. Ĝis la revido, do, Karaj Geamikoj, kaj ĝis pluaj venkoj.

## MALFERMA PAROLADO

de  
S-ro R. DE SAUSSURE

(Fino.)

Ni jam havas ekzemplon de Esperantista internacia organizado per „UEA“ (Universala Esperanto-Asocio); la sola diferenco estas, ke „UEA“ celas nur la praktikan aplikadon de Esperanto, dum „IAE“ celus nur la propagadon. La du kampoj de agado, propagando kaj praktika aplikado, estas du kampoj sufiĉe vastaj kaj apartaj, por pravigi la ekziston de du organizadoj en la Esperantistaro. Ambaŭ estas jam sufiĉe konataj kaj fortaj, por ne timi konkurencon. Do ni akceptu ambaŭ, kaj ni kreu inter ili amikajn kaj precizajn interrilatojn, tiamaniere, ke ili povu sin reciproke interhelpi. Tio certe estas la sincera deziro de multaj Esperantistoj.

Resume, ĉe la sojlo de la nova periodo de nia historio, rigardante de vidpunkto kiel eble plej neŭtrala la ĉefajn instituciojn de la Esperantista movado, mi komprenas ilin jenmaniere:

a) *Lingvaj* institucioj: „ELK“ (Esperantista Lingva Komitato kun ĝia Akademio) kaj sekretario en la lando de ĝia prezidanto;

b) *Propagandaj* institucioj: „IAE“ (Internacia Asocio Esperantista) kaj ĝia centra oficejo en Parizo;

c) *Aplikaj* institucioj: „UEA“ (Universala Esperanto Asocio) kaj ĝia centra oficejo en Ĝenevo.

5-e. Koncerne *niajn internaciajn kongresojn*, ili estas kaj restos ĉiujara *festoj* de la Esperantista popolo; tamen dum tiu festo okazas aŭ devus okazi laborokunsidoj el du kategorioj:

a) La oficiala parto de la kongreso, konsistanta el la kunsidoj de la „LK“ (por la lingvo), tiuj de „IAE“ (por la propagando) kaj tiuj de „UEA“ (por la aplikado).

b) La neoficiala parto, konsistanta el la diversaj fakkunsidoj de „IAE“ aŭ de „UEA“ (kuracistoj, katolikoj, framasonoj, k. t. p.).

Ŝajnas al mi, ke la nuna kongreso estas jam preskaŭ konforma al tiu plano, se ne teorie almenaŭ fakte. Efektive, sufiĉus anstataŭ „ĝenerala labora kunsido“ skribi sur la programon: „ĝenerala labor-kunsido de „IAE“, ĉar koncerne la labor-kunsidojn de „UEA“, ili jam estas sur la nuna programo.

Tamen mi denove insistas pri tio, ke ĉio, kion mi diris ĉi-supre, estas nur persona opinio.

\* \* \*

Konklude permesu al mi diri, ke fari la malferman paroladon de la IX<sup>a</sup> kongreso estis por mi granda kaj neatendita honoro, sed ankaŭ grava prirespondeco, se vi konscias, ke ĝis nun tiu parolado estis farata de nia Majstro mem. Mi provis imiti tiel bone, kiel mi povis, lian senpartiecon kaj pacamon, montrante la nunan situacion de la movado Esperantista de vidpunkto neŭtrala. La aktualaj demandoj tamen estas tiel malfacilaj, ke mi estos feliĉa, se mi nur duone sukcesis. Sed kion ajn ĉiu opinias, la sola necesajo por la sukceso de nia afero estas la libera kaj paca diskutado de ĉiuj demandoj, interesantaj la Esperantistan movadon.

Pro tio mi deziras fini mian prezidantan paroladon, rememorigante al ni ĉiuj, karaj gesamideanoj, la lastan deziron, esprimitan de nia Majstro en lia oficiala parolado en Krakovo: „En la unuaj jaroj de nia laborado, — li diris — estis skribitaj sur nia standardo la vortoj: *espero, obstino kaj pacienco*; tio tute sufiĉis, ĉar, ke ni gesamideanoj, devas reciproke nin estimi kaj helpi, tio por ĉiu estis komprenebla per si mem. En la lastaj jaroj tamen, ni bedaŭrinde ofte forgesis tiun devon: tial nun, transirante en la duan gravan periodon de nia historio, en la duan kvaron-jarcenton, ni skribu sur nia standardo novan vorton, kaj ĉi tiun vorton ni ĉiam respektu kiel sanktan ordonon; tiu vorto estas „konkordo“.

## PAROLADO

de

S-ro Rousseau, vic-prezidanto de UEA,  
ĉe la solena malferma kunsido de UEA

*Karaj gekongresanoj,*

Certe mi esprimos la intiman penson de ni ĉiuj, dirante la grandan bedaŭron kiu nin kaptas, ne vidante ĉi tie sur la ĉefa seĝo, la simpatian kaj kutiman silueton de nia amata prezidanto, S-ro Mudie. Tre grava privata afero lin devigis veturi Kanadon, kie, mi estas certa, li tamen forgesas nek nian movadon nek nian asocion. Sen ia dubo li sukcesos disjeti tie, per sia konata elokventeco kaj lerteco kelkajn bonajn ĝernojn, kiuj baldaŭ portos valorajn fruktojn. Ke li tamen estas kun ni per la penso, pravas la fakto ke li sendis al li ni sian kutiman paroladon kiun tuj legos S-ro Kolonelo Pollen, lia anstataŭanto.

Mi proponas, karaj gesamideanoj, ke ni sendu al nia prezidanto, ne telegrame, ĉar li riproĉos nin pro malŝparemo, sed letere je la nomo de la IX<sup>a</sup> Kongreso de UEA, la esprimon de nia bedaŭro pro lia foresto kaj nian plej fidelan saluton.

Pro la foresto de nia prezidanto, mi ja havas la grandan honoron prezidi nian kongreson kaj direkti ĝian laboron. Mi provos plenumi mian oficon kiel eble plej senpartie, metode kaj orde; kaj mi estas certa ke, de via flanko, vi ĉiam volos, en niajn diskutojn alporti la toleremon, la moderecon en la vortoj, kiuj ĝis nun karakterizis ĉiujn niajn kongresojn.

Mi sentas ke nia unua devo en la komenco de tiu ĉi kongreso estas turni kun vi niajn pensojn al tiuj esperanta ianoj, kiujn la kruela morto forrabis de ni dum la lastjaro. Mi unue citu la agemajn delegitojn:

Mare, Del. en Portsmouth, DD. por Sud-Anglujo; Niedwiedzky, Del. Minsk, DD. por Orienta Rusujo; kaj Richardson,

DD. en Bruselo kaj DD. por Belgujo, la ĉefo de niaj katolikaj samideanoj kiu tiel malfeliĉe mortis antaŭ nur kelkaj tagoj.

Inter niaj membroj mi volas almenaŭ citi la respektindan P-ron Dor, prezidanton de la Lyon'a Esp. grupo kaj de TEKA, kiu donis al nia asocio tiom da pruvoj de sia simpatio, S-ron de Ladevèze, kiu tiel multe faris por nia afero en Germanujo, kaj ĉefe profesoron Carlo Bourlet, Viceprezidanton de la KKK, prezidanton de la Pariza Esp. grupo konatan kaj ageman matematikiston, kiun tiel blinda kaj kruela sorto frapis antaŭ apenaŭ du semajnoj. Jam de 13 jaroj li senlace bataladis por Esperanto; la laboro plenumita de li estas netaksebla. La loko kiun li okupis en nia afero estis ja tre granda kaj la subita malpleniĝo de tiu loko konsternas nin. Certe, li ne ĉiam plene aprobis, ĉefe en la komenco, la agadon de nia asocio. Sed laboremulo kiel li ĉiam kliniĝas antaŭ la laboro konsciencie kaj senhalte plenumita; li, en la lasta tempo plene komprenis la altan rolon de UEA en nia movado kaj, kelkajn tagojn antaŭ sia morto, li ankoraŭ skribis al nia prezidanto: „Vi scias, kia estos mia persona inklino por UEA...“ En Krakovo, li bone sukcesis, per taŭgaj vortoj, forprokrasti la demandojn, kiuj povus malkvietigi la esperantistojn, kaj post la trankvila kaj fruktoriga laborjaro, kiun ni ĵus travivis, ni ĉiuj havis la konvinkon ke nun, en ĉi tiu kongreso, ni povus precizigi, en plena interkonsento, taŭgan planon de kunagado inter ĉiuj batalantoj por nia afero kaj kune prepari la X<sup>am</sup> Esp. Kongreson en Parizo, por kies triumfo li estus oferonta sian tempon, sian tutan energion kaj sian grandan influon.

Mi proponas, karaj geesperantianoj, ke ni honoru la memoron de ĉiuj niaj mortintoj, konataj aŭ humilaj, per levigo de niaj seĝoj.

Kaj nun, post pia penso al tiuj, kiujn ni perdis, ni rigardu kuraĝe al la estonteco. La tasko, kiun ili lasis al ni estas ja vasta, sed ĝi ne tro pezos sur niaj ŝultroj se ni scios profiti la instruojn de la estinteco. Ni memoru, ke ĉiu interna batalo estas malfortiĝo, ke nia celo estos atingita nur per unuigo; ke ni povos esti unuigitaj nur se ni havas komunajn fundamentajn principojn; ke ni povos interkonsenti pri principoj nur se ni serioze pridiskutas ilin; ke diskutado povas esti serioza kaj konduki al interkonsento, nur se ĝi estas tolerema, laŭregula, ĝentila, senpartia kaj senpasia; ke, nome, diskutado povas esti senpasia, nur se ĉiuj, ĉu individuo, ĉu loka, nacia, aŭ faka grupiĝo, forjetas ĉiun egoistan priokupon, kaj celas nur la ĝeneralan bonon kaj utilon de nia tuta afero; fine ke, kun komunaj principoj, ni ne povos fari definitivan paŝon antaŭen, se ni ne havas komunan planon de agado kaj severan disciplinon.

Planon de organizaĵo mi tute ne volas alporti al vi. Hieraŭ en la solena malfermo de nia naŭa Kongreso de Esperanto, kiu certe impresis nin ĉiujn, pro la nun tute digna kaj kvieta, ĉiam pli alta sento en ĝi reganta, nia eminenta samideano S-ro René de Saussure per tre ŝatitaj vortoj sciis montri al ni la rolon kaj la taskon, kiujn ĝis nun plenumis: 1<sup>e</sup> la Lingvaj Institucioj; 2<sup>e</sup> la Propagandaj Societoj; 3<sup>e</sup> Universala Esperanto-Asocio. UEA estas al li speciale danko, ke li bonvolis tiel klare prezenti al ni, kian grandan lokon ĝi devos okupi en la aranĝoj, kiuj estos interkonsentitaj por pli harmonia kunlaborado de la tuta Esperantistaro.

Mi do nur volas al liaj paroloj aldoni kelkajn pensojn, kiuj iom-post-iom enloĝiĝis en mian kapon, de la unua momento de la ekzisto de UEA ĝis la hodiaŭa momento,

dum mia konstanta kvankam modesta partoprenado, ĉu en la prizorgoj, ĉu en la sukcesoj de nia Asocio.

Unue, ni ne tro severe klasigu niajn samideanojn en fermitajn kategoriojn, inter kiuj ni malpermesus ĉiun komunikadon. Ni komprenu ja bone, ke malgraŭ ŝajniaj diferencoj, estas multe da unueco en la mentalo, kaj en la etikaj priokupoj de la Esperantistaro; ke ni ĉiuj ofte estas samtempe propagandistoj, instruistoj, uzantoj kaj eĉ verkistoj; ke ne estas tre oportune ŝanĝi, — kiel majstro Jakobo en konata komedio, — plurfoje dum la tago sian oficialan veston por plenumi sinsekve la diversajn partojn de sia tasko. Ni celu do kiel kiel eble plej multe da *ligiloj* inter la diversaj partoj de nia organizaĵo; dum ni volas disbati la barojn kiuj disigas la popolojn, ni ne penadu por starigi murojn inter la Esperantistoj.

Ekzemple estas opinio ne ĉiuokaze prava, kaj ofte danĝera, ke la lingvaj priokupoj povas, ĉe la Esperantistoj, esti plene apartigitaj de la praktikaj priokupoj. La lingvo estas la necesega ilo de la uzantoj; kaj neniu neos sekve, ke la uzantoj havas la rajton konstante kontroli, ĉu sia ilo restas ĉiam preta por efika funkciado, kaj estas nek difektata, ne fuŝata de fremdaj manoj, pro teoriaj aŭ fantaziaj celoj.

Kontraŭ la faktoj ankaŭ falas alia prijuĝo, tro enradikigita ĉe multaj samideanoj, ke propagando kaj aplikado povas, en la praktiko, esti facile apartigitaj. — Ĉu ni ne devas ĝoji kiam ni aŭdas, ke Esperantistaj grupoj helpas, per Esperanto, por la diskonigo kaj pliriĉiĝo de sia urbo, uzante parton de sia mono, eldonante gvidfoliojn kaj gvidlibrojn, aŭ kiam ni ekscias, ke la franca Societo por la propagando de Esperanto proponas siajn servojn al la ĵus fondita ĝenerala Komitato por Turismo en Francujo, por uzi Esperanton en la disfamigo de la francaj naturbelajoj eksterlanden? Ĉu ni ne devas ankaŭ ĝoji, se, pro la disvastiĝo de sia labor-kampo, UEA sciiĝas, ke ĝi bezonas pli grandan nombron de bone Esperanto-parolantaj membroj kaj Delegitoj? Kaj se ĝi sin turnas al la naciaj Societoj kaj grupoj — kiuj ĝis nun tiel energie klopodis por aranĝado de kursoj kaj ekzamenoj, — koniĝas al ili siajn dezirojn pri instruado kaj diplomoj, kaj laŭeble helpas per ilia plenumado?

Kaj fine ni ne forgesu ankaŭ la fakajn societojn. En kiun kategorion ni devus klasigi la Tutmondan Esperantistan Kuracistan Asocion, kaj la ĵus kreitan Sekcion de Fizikistoj kaj Ĥemiistoj kiuj ambaŭ: 1<sup>e</sup> zorgas pri teknikaj vortaroj; 2<sup>e</sup> propagandas Esperanton en la kuracistaj fizikistaj, Ĥemiistaj rondoj; 3<sup>e</sup> uzas Esperanton por pritrakti teknikajn kaj sciencajn temojn pri medicino, fiziko kaj Ĥemio?

Alia konvinko kiu, pro la bedaŭrindaj politikaj okazintaĵoj de la lasta tempo, pli kaj pli firme enradikiĝis en nin, estas ke ni, pli ol iam, devas priatenti la nacian ofendiĝemon. Ni ĉiam zorgu trafi plenan neŭtralecon en nia internacia Esperantista radaro, rilate al nacieco: Niaj komitatoj, nia mono, niaj sidejoj, niaj oficejoj ŝajnu nek britaj, nek germanaj, nek francaj, nek rusaj: ili estu plene inter- aŭ pli bone supernaciaj. En UEA ni ĉiam provis, certe kun plena sukceso, konservi ĉi tiun neŭtralecon.

Mi nun finos per ĉi tiu grava admono al vi, karaj geesperantianoj, ke, ĉu tiu aŭ alia formo de organizaĵo estos elektata, vi faru kune kun mi, la solenan mempromeson, montri per via fervoro, per via laboremo, per via seriozezo, per via pacamo, en tiu-ĉi kongreso kaj en via posta agado, ke nia kara UEA estas en la unua vico inter tiuj grupiĝoj, kiuj laboras por la homara progreso, por la tutmonda konkordo, per Esperantismo.

# PAROLADO DE S<sup>RO</sup> HODLER

ĉe la malferma kunsido de UEA

*Karaj Samideanoj,*

La laborjaro, kies finon alportas nia kvara kongreso, plenumiĝis en agitataj eksteraj cirkonstancoj. La intergenta paco, kiu estas tiel necesa por nia progresado, estis longe rompita sur parto de Eŭropo, kie nia afero iam prospere disvolviĝis, kaj oĝte niaj koroj tremis je la penso, ke la fantomo de pli ampleksa milito povus enkorpigi kaj por longa tempo nuligi multjaran nian paciencajn laboradon. Tiu terura timindaĵo feliĉe ne okazis, sed la ondo de ŝovinismo, kiu trapasis Eŭropon, la atmosfero de malpaco kaj sango, en kiu ni vivadis, nedubable malhelpis la antaŭeniron de nia afero. Nuntempe, sub la influoj de aluditaj okazintaĵoj, ni devas konstati malprogreson de la internaciemaj ideoj, je kies irado — kiam ajn opinio oni havas pri Esperantismo — estas intime ligata nia movado. Kĵiam aŭdiĝas la bruo de la armiloj, kiam ĉiu estas konvinkita, ke la sovaĝa batalo de la homo kontraŭ la homo devas anstataŭi la batalon de la homo kontraŭ la naturo kaj la mallumo, tiam ni ne esperu, ke multe progresos nia afero, kiu bazas sur intima trankvila kunlaborado de la homoj el ĉiuj gentoj kaj el ĉiuj nacioj. Teorie, oni ĉiam povas aserti, ke Esperanto, estante nur lingvo, povas servi egale por la paco kiel por la milito; praktike, neniu senpartia homo povas nei la parencecon de la internaciemaj movadoj kun nia.

Aludante tiujn faktojn, mi nur celas montri, ke la jusa forpasinta laborjaro estis malfacila periodo. Mi neniel deziras trograndigi kaj aserti, ke la plifortiĝo de la ŝovinismo estas daŭra fenomeno, kiu respondas al natura evolucio kaj sekve ĉiam baros nian vojon. Ĝi estas nur movado de opinio, kiu — pro la sensencaj ŝarĝoj, kiujn ĝi pezigas sur la vivo de la popoloj — baldaŭ cedos lokon al kontraŭa movado tiel same kiel la alfluon de la maro furioze batanta la bordojn sekvas la forfluo, kiu donacas al homo novajn liberajn spacojn.

Ĝis tiam ni ne antaŭvidu tre grandajn progresojn, sed ni iru malrapide, senŝancele kaj serioze.

Sed, karaj samideanoj, ne nur eksteren ni devas rigardi, sed internen de nia afero.

Vi scias, ke la lastan jaron ni venis al vi kun malĝojaj informoj pri la financa stato de nia Asocio. Tiu ĉi situacio estis tia, ke ni devis proponi al vi radikalan rimedon por ĝin plibonigi. Duobligante la kotizajon ni riskis perdi parton de nia membraro. Pesimistaj profetoj eĉ asertis, ke tion, kion ni gajnos el unu flanko, ni perdos el la alia. Tiuj antaŭdiroj ne realiĝis. Pli ol la du trionoj de niaj membroj restis al ni fidelaj. Ni ne scias, kiun ni devas plej gratuli, ĉu la membrojn, kiuj konsentis tiun pluan oferon, ĉu la Delegitojn, kiuj penis por konservi kiel eble plej multe el niaj membroj, ĉu UEA mem, kiu per sia agado havigis al si tiom da fervoraj amikoj. Ne malpli korajn dankojn ni ŝuldas al la sindonemaj samideanoj, kiuj favore respondis nian alvokon por la kreo de Garantia Kapitalo. Dank' al la helpo de unuj kaj de la aliaj, la financa stato de UEA senteble pliboniĝis.

La raportoj, kiuj estos submetataj al tiu kongreso, detale pritraktas la diversflankajn agadojn de nia Asocio. Ni petas, ke vi bonvolu ilin atente ekzameni kaj aktive partopreni en la interŝanĝado de ideoj, kiun ili naskos. Pasiva aprobo nin certe ne ĝojigus. Koscian kaj atenteman ekzamenadon ni deziras, ĉar ili en vivanta maniero atestos pri la intereso de niaj membroj je la prospero de nia Asocio.

Oni nur permesu al ni — tralegante tiujn diversajn raportojn — substreki la fakton, ke la nombro de la

Esperantaj servoj regule kreskas ne sole rilate al la nombro, sed ankaŭ rilate al propra graveco kaj seriozece. En tio ĉi kuŝas la merito de UEA, ke tuj de la komenco ĝi proponis servojn al siaj membroj, ĝi favoris ilian reciprokan interkomunikiĝon, kaj povis — post malmulte da tempo — prezenti palpeblajn rezultatojn. Ni insistas pri tio, ke UEA devas havi popularan karakteron. En la granda nombro de internaciaj organizaĵoj kaj institucioj, kiuj kreiĝis en la daŭro de la lastaj jaroj, tro multaj limigas sian agadon je pure sciencaj aŭ teoriaj laboroj, kiuj havas intereson nur por malmultaj homgrupoj. Estas la honoro de Esperantismo, ke ĝi penas anstataŭi la pure teorian internaciismon per praktike travivata internaciismo, kiu, ne embarasante sin per formuloj aŭ doktrinfasadoj, rilatigas frendulon kun frendulo pri ĉiuj sferoj de la homa vivo, sur vere neŭtrala kampo. Per sia interŝanĝado de servoj ĉiujare pli multe uzata, UEA ne sole donas propran profiton al la uzantoj de tiuj servoj, sed ĝi praktike instruas al ili internacian spiriton, t. e. klarajn ideojn kaj ĝustajn konojn pri la vivo kaj mentaleco de la diversaj popoloj, sen kio ĉia alia jura alproksimiĝo estas neplenumebla en vere sincera maniero. Oni eble diros, ke ankoraŭ tre malmultaj gravaj firmoj aŭ societoj uzas la servojn de UEA, ke tiuj ĉi ankoraŭ ofte koncernas malgravajn aferojn. Sed pri tio oni devas atenti, ke, se tre grandaj firmoj aŭ societoj havantaj gravajn monrimedojn povas facile interkomunikiĝi sur la internacia kampo, ekzistas tre granda nombro de malpli grandaj firmoj kaj societoj, tre granda nombro de privatuloj, kiuj ne estas en tiel favora situacio. Al ĉiuj ĉi tiuj sin nun precipe turnas UEA kun siaj servoj.

(*Daŭrigota.*)

## Tra la mondo

*Madrid.* — Pro fulmo, pulvejo eksplodis, mortigis unu personon kaj vundis tridekses.

*Bruxelles.* — Generalo Michel, eksministro de l'militistaro, ĉefkomandanto de Anvers, forlasis sian oficon.

*Gent.* — La internacia kongreso pri helpado al la militvunditoj estas malfermita, precize kiam ironie oni inaŭguraciis en den Haag la novan Pacpalacon.

*Pola.* — Oni enterigis la vicadmiralon de Lanjus.

*Roma.* — Dum aŭtuno la italaj gereĝoj intencas vojaĝi en Libio.

*Versailles.* — Aviadisto Marnier forflugis el Biarritz per monoplano por konkursi la pokalon Pommery; lin malhelpis forta vento el nord-okcidento.

*Bern.* — Oni retrovis sur la montaro Niesen la kadavron de junulo falinta la 3-an de aŭgusto, dum li kolektis edelvejsojn.

*Posen.* — La imperiestro kaj lia filo ĉestis paradon de la kvina korpuso.

*Barcelona.* — Apud Bilbao vagonaro venanta el Barcelona puŝrenkontis du lokomotivojn; du mortintoj, kvardek vunditoj.

*Catane.* — La vulkano Etna elŝprucas cindrojn kaj fumon.

*Belgrade.* — La internacia komisiono, sendita por enketi kaj eltrovi la veron pri la kruelajoj dum la Balkana milito, alvenis.

*Krojanke.* — Vagono el la rapida vagonaro Königsberg-Berlin elreliĝis; unu mortinto, dek vunditoj.

*Glasgow.* — Malfermiĝis la dua internacia Kongreso de l'kooperativaj societoj; sescent delegitoj reprezentas unu milionon da kooperatanoj el ĉiuj landoj.

## OFICIALA

## KONGRESA GAZETO

N-o 6

Aldono al ESPERANTO

30 Aŭgusto 1913

REDAKCIA LETERKESTO EN LA AKCEPTEJO

*La Kongresa Gazeto aperas ĉiutage dum la Kongresoj  
kaj kostas 10 centimojn po Numero*

## OKAZONTAĴOJ

## Dimanĉo 31 aŭgusto

- 9 h. 30 Festa ferma kunsido de la Kongreso de Esperanto en la ĉambrego de la Kazino.  
11 h. 30 Ekzercoj de la Ruĝa Kruco kaj liberaeraj predikoj sur la monto Gurten.  
12 h. 30 Festeno sur la monto Gurten (karto antaŭaĉetota: 3 Fr.).

Posttagmeze Popola svisa festo.

## Lundo 1 septembro

- 7 h. 45 De la stacidomo de Bern, forveturo de la Karavano de UEA tra Svisujo.

## OKAZINTAĴOJ

## KONGRESO DE ESPERANTO

## 2-a Ĝenerala Labora Kunsido.

Merkredon posttagmeze je la 3-a  $\frac{1}{2}$  S-ro Stettler, vic-prezidanto de la IX<sup>a</sup>, malfermas la kunsidon.

S-ro Chavet legas la protokolon de la 1-a kunsido; protokolo unuanime akceptata.

S-ro Chavet legas la raporton pri ĝenerala organizaĵo. S-ro G-lo Sébert donas kelkajn klarigojn kaj diras, ke li korespondadis kun kelkaj naciaj societoj kaj ke la projekto ŝajnas akceptinda. Neniu petas la parolrajton pri la raporto, kaj oni voĉdonas pri la jena propono: „La IX<sup>a</sup> Kongreso konsilas al la internaciaj societoj aliĝi al la Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Societoj.“ La komisiono pri ĝenerala organizaĵo kaj la subkomisiono nun finis sian taskon.

Esperantisto el München parolas pri la Ponto; S-roj Schmid kaj Boucon kaj aliaj partoprenas la diskutadon.

Fine S-ro D-ro Wenger donas klarigojn pri la oratora konkurso. L. P.

## Fakaj Kunsidoj.

*Kuracistoj* (TEKA). — En la dua kunsido de la kuracistoj, marde 5.15, kiun la Majstro mem bonvolis partopreni, la medicina terminologio estis diskutata post referato de D-ro Uhlmann. Merkrede matene la TEKA-anoj aŭdis du referatojn pri sciencaj temoj de D-roj Šidlovski (Moskvo) kaj Robin (Varsovio). Poste D-ro Christen (Bern) kondukis siajn eksterlandajn kolegojn tra la medicinaj institutoj de la urbo, inter kiuj precipe la instituto de P-ro Kolle por studado de infektaj malsanoj estis interesplena, dank' al la afabla kondukado de ĝia subdirektoro P-ro Tomarkin. T. C.

*Arĥitektoj*. — Mercredon vespere okazis en la Universitato la unua Kunveno de la Arĥitektoj, Inĝenieroj kaj ĉiuspecaj konstruistoj esperantistaj. La celo de la fondota grupiĝo estas interrilatigi la arĥitektojn tutmondajn kaj havigi al ili la necesajn rimedojn por profesia interhelpado. La Asocio oficiale estos fondita nur dum la Paris'a kongreso. La kolegoj, kiuj ne povis ĉeesti la kunvenon, estas petataj sin konigi de nun: aliĝo estas senpaga, nur oni devas esti UEA-ano. La estraro ĵus elektita enhavas kiel prezidanton S-ron D. A. Agache, arĥ. D. P. L. G. 11, rue Eug. Flachet Paris; kiel vic-prezidanton S-ron Vermaas, arĥ. Rotterdam (Holandujo); kiel sekretarion, S-ron Génermont, arĥ. E. D. B. A. Moulin-sur-Allier (Francujo). H. P.

*Libera Penso*. — Mardon 26 Aŭgusto je 5 h.  $\frac{1}{2}$  okazis en la Universitato la unua Kunveno de la Societo Libera Penso. Ĉeestis 40 personoj el 8 nacioj, membroj de la Societo aŭ aliĝontoj. Post aprobo de la jara raporto de l' sekretario, ili decidis rekomendi por la skriba voĉdono, kies preparo estas la Kunveno, la jenajn rezoluciojn: 1<sup>e</sup> kvankam teorie, kaj laŭ la regularo, la celo de la societo estas defendi la liberecon de la penso sur ĉiu kampo, tamen pro praktikaj konsideroj ne enmiksi ĝin sen neceseco en politikajn aferojn. 2<sup>e</sup> sendi sinceran kuraĝigon kaj simpatiesprimon al la gazeto „Homaro“, kiun oni proponis alpreni kiel oficialan organon, sed konservi la propran bultenon de Libera Penso. Prokrastinte la sekvon de l' tagordo al la dua Kunveno, la ĉeestantoj danke akceptis inviton de la libera pensista societo en Praha (Bohemujo) por la Universala Kongreso de Liberpensuloj, kiu okazos en tiu urbo en 1915. Fine ili decidis sendi salutleteron al la monista Kongreso en Düsseldorf, ĉe kiu ageme propagandas idistoj.

Vendrede 29 aŭgusto je 8 h.  $\frac{1}{2}$  okazis en la Universitato

la dua kunveno de la Societo Libera Penso. Laŭ la sekvo de la tagordo estis voĉdonate ke la jara kotizaĵo restu fiksita je Fr. 2.50 minimume, sed ke lokaj grupoj da almenaŭ 10 anoj ricevu rabaton de la duono. Nomoj estis proponataj por la skriba elekto de du komitatanoj. Sistema propagando ĉe estraroj de naciaj liberpensulaj societoj kaj ĉe gazetoj estis studata. Reprezentanto por la liberpensula kongreso en Lisbono estis rajtigita. Fine la kunvenintoj unuanime decidis sendi respektan kaj fervoran dankon al nia majstro Zamenhof pro la kuraĝo kaj la nobleco kun kiuj en sia deklaracio pri Homaranismo li asertis la principon de vere libera penso, farante al la homoj por morala progreso, per tia parolo kaj ekzemplo, duan servon, egale netakseblan. R. D.

### Internacia Balo

„La Elfoj dancas sur la vasta ebenaĵo“ diris franca poeto . . . . kaj hieraŭ „ĉe horo dekdua en nokto“ laŭ rusa poezio . . . dancadis en la Kazino Esperantistoj el ĉiuj nacioj, inter kiuj multaj estis nacie vestitaj. Sed mi povas vin certigi, ke ili tute ne similis al Elfoj. Anstataŭ verdaj lunradioj heligantaj arbaran maldensejon, blindigaj elektraĵoj lampoj rebrilis sur la planko; anstataŭ nenatura aera muziko surdigantaj trombonoj ritmis la takton de l' violonoj; anstataŭ nebulaj aperaĵoj glitantaj malpeze, viglaj paroj turniĝe minacis la piedojn de la nesingardemaj rigardantoj. La podiumo de la salonego en la Kazino estis okupita de la orĥestro, kaj flanke, inter abiaj branĉoj, oni estis organizinta malsuprengriletojn, sur kiu niaj gesamideanoj harde ekzercigis al montaj sportoj.

Multaj estis precipe la svisaj kaj la oberlandaj kostumoj. Ni ne povis noti ĉiujn. Sed kelkaj personoj tre afable bonvolis skribi sian nomon kaj la devenon de l' kostumo. Jen la listo laŭ ordo de enskribiĝo:

S-ro Hans Tressel, la modela Delegito de UEA en München (bavara montarano), S-ino Farges, la tte sindonema direktorino de la Lyon'a Esperanto-Oficejo (kampanarino el Arles, Provence), S-roj Denninger kaj Feuerbach, el Mülhausen (Elzacanoj), S-ro Delanoue, nelacigeble dancanta (franca kortegano de XVII<sup>a</sup> jc.), bela Moravia grupo: S-inoj kaj F-inoj Janalikova, Minarikova (slovakinoj), Navratiklova (valaĥino) kaj Brablcova (hanakino), S-ino Rouveret (kampanarino el Provence), F-ino Leser (bavaro), S-ino Hartg, (litova kampanarino), F-ino Loder (bernanino), la tre konata aŭtorino Roksano (kampanarino el Béziers, Francujo), F-inoj Schmid (bernaninoj), S-roj Burghold (bernaninoj), S-roj Merz (gemontaranoj el Appenzell) (tiuj ses antaŭaj meritas apartan citon pro ilia kuraĝa dancado post tiom pena laboro en la akceptejo dum la tuta semajno), S-ino Wuyts kaj F-ino Hericke (flandraj kampanarinoj) kaj multaj aliaj estus sin enskribintaj, se tiam ili ne estus estintaj forpelataj de teruriga berna urso, kiu blekante kaj minacante per siaj dentoj kaj ungegoj forkurigis ĉiujn.

Inter dancoj, jodlistoj admirigis sian apartan arton.

Je la 12-a la plej granda parto de ĉeestantoj noktmanĝis en najbaraj ĉambregoj. Tiam ni konsciis, ke la Esperantista movado ne estas en danĝero, ĉar vere admirinda estis la ĝenerala kuraĝa antaŭenemo de ĉiuj . . . al la bufedo. Poste la dancoj rekomenciĝis kaj daŭris dum la tuta nokto.

Malgraŭ pluraj avertoj de la Organiza Komitato ni vidis ĉe la balo fuŝfantaziajn kostumojn: 1<sup>e</sup> nigra frako kun cilindroĉapelo, brusto kovrita per lunaj ordenoj, vizaĝo ornamita per riĉaj lipharoj; 2<sup>e</sup> vira esperanta kostumo kun danaj koloroj; 3<sup>e</sup> fraŭlina esperanta kostumo, blanka, sur la robo de malsupre supren naŭ ŝildoj kun la nomoj (en franca lingvo!) de la naŭ Kongresoj de Esperanto, supre ĉe la dorso inter la ŝultroj aŝiŝo kun la vorto „Esperanto“, tre


taŭga por reklamo pri ekzemple Tobler'a ĉokolado; kaj kelkaj aliaj.

Ni esperas, ke proksiman jaron en Paris nepre ĉiuj volos esti decaj, ĉar la „titi“ (t. e. la Paris'aj stratbuboj) estas tre ŝercemaj kaj la tuta loĝantaro tre mokema pri tiaj fantaziaĵoj. LUPO.

## Oratora konkurso

Sub prezido de S-ro Wenger ĵus okazis en la Kazino la oratora konkurso. La prezidanto saĝe admonis la ĉeestantojn, ke ili silentu, kaj vice alvenis la diversnaciaj konkursoj.

S-ro Dalmoa, Kataluno, devis paroli pri „kuraĝo“, sed li iom flankklasis sian temon por kulpigi la balon, la konkursojn kaj la kafon, ke li ne havis sufiĉan tempon kaj forton por pli elokvente paroladi. „Naskiĝas poeto kaj fariĝas oratoro.“ Li volas fariĝi oratoro ĉar li kredas al persistemo kaj al kuraĝo, kaj finante li laŭdas kuraĝon de knabo, kiu



P-ro R. DE SAUSSURE, prezidanto de la Akcepta Komitato

starigas sur seĝo ne timante fali planken, li laŭdas la kuraĝon de l' kongresanoj, li laŭdas la kuraĝon de D-ro Zamenhof. Vortoj estis bonaj, tre malmultaj gramatikaj eraroj; sed S-ro Dalmoa devos peni por ne tiom flankiĝi de la temo.

S-ro Pichon, Franco, elektis kiel temon toston al „Patrujo“. Tuj filozofe, beletristike, li dividas la temon; tre klasike li starigas planon, kiun li poste tre ĝuste sekvas; S-ro Pichon estas juna licenciato de la Sorbonne, kaj en lia parolado ni tre plezure rekonis la aplikon de la principoj, kiuj estas la fundamento de la supera literatura instruado en la unua franca universitato. Unue laŭ eksperimenta maniero li pristudas la historion de la ideo de patrujo; due morale li priskribas la rajtojn kaj la devojn de ĉiu homo kontraŭ patrolando. Li finas per poeziaj ekflugo, kiuj tre impresas la ĉeestantaron. Iom tro rapidflua parolo, kelkaj ne tre ortodoksaj vortoj, ne pli ol unu aŭ du forgesitaj akuzativoj, sed vere oratora temperamento.

S-ro Van Schoor, Belgo, pritraktas la „Universalan Fratecon“. Certe altajn sentojn li esprimis, sed vortoj tiel grandaj estas tro vastaj por enteni ion realan. La akcento eble povus esti pli bona, sed precipe la raŭka voĉo estis laciga; ankaŭ liaj parolŝanceliĝoj estis bedaŭrindaj.



S-ino Tropeolo, iom tro modesta Francino, ne kuraĝis elmontri sian nomon; ni do ne malkaŝos la sekreton. Ŝi parolis pri „Legado de seriozaj libroj“. Ni ŝatis le difinon, kiun ŝi diris esti kutima: „Serioza libro estis tiu, kiu ne temas pri amo.“ Sed ŝi penis konvinki nin, ke „serioza libro estas tiu, kies legado igas nin pensi kaj pripensi“. Tre delikate ŝi parolis, sed ve, la akcento estis ĉiam prokrastata, kaj la gramatikaj finiĝoj tro laŭte sonis.

S-ro Jacobs, Belgo, eniras terure tremigantan vojon: „Mortpuno!“ Li nigre priskribas la diversajn pli malpli elegantajn rimedojn, kiujn uzas la ŝtatoj por malaperigi krimulojn. Li parolas pri „gilotino“ en Francujo kaj pri „elektra elektreco“ en Usono. Li poste atakas la principon: ĉu socio rajtas mortigi por puni mortigon? Sed pro laco lia voĉo iom falas; la publiko protestas; subite ni kredas aŭdi la voĉon mem de S-ro Schmid, sed vere ne estas eble, ĉar li ĝuste forestas; ĉiuj estis erarigitaj, ĉar S-ro Jacobs elparolis dum kelkaj minutoj tute same kiel S-ro Schmid. Konklude li al ni proponis fondi novan societon (kiom da prezidontoj?) celontan al la forigo de l'mortpuno.



ED. STETTLER, vic-prezidanto de la IX-a Kongreso.

S-ino Wight, Britino, respondis la demandojn: „Kiun valoron havas la sano? Kiel akiri aŭ konservi ĝin?“ Komence ŝi tre ĝuste parolis pri korpa kaj pri spirita sano, sed bedaŭrinde ĉe la fino ŝi estis tro laca, kaj ideoj ne tre rapide estis prezentataj. Eĉ komence S-ino Wight parolis malrapide, kaj dank'al ŝia atento la elparolado estis bona kompare kun la malfacilaĵoj, kiujn havas la Britoj por ĝuste kaj pure sonigi la vokalojn. Ŝia konfeso, ke ŝi estas sufragistino, ne forigis de ŝi la ĝeneralan simpatian: se ĉiuj sufragistinoj ne estus pli revoluciemaj ol ŝi...

S-ro Mahn, Germano, lastmomente ŝanĝis la temon, kiun li estis antaŭe elektinta, kaj devis glorigi: „Iu heroo de l'historio.“ Tre trafe li trovis indajn vortojn por trafe laŭdi la verkon de Zamenhof. Heroo estis la Majstro, kiu nun tro modeste ne volas plu esti nomata Majstro, kiam ĉe la unuaj jaroj li, sola, persiste, energie, kuraĝe penadis por fine atingi la helan celon, en kiu li baldaŭ triumfos. La temo vekis aplaŭdojn, sed la parolo mem ne estis tiel perfekta; tro da ŝanceliĝo; la literoj „s“ estis elparolataj kiel „z“, k. t. p.

S-ro Raczi, Hungaro, inkline parolis pri la „Protekto de la infanoj“. Ĉu li estas edukisto? Ni ne scias, sed li

ŝajnas havi sperton pri tio; tre ĝustajn ideojn li al ni prezentis pri la korpa kaj spirita edukado de la infanoj. Je tiu vidpunkto, ni ne agu blinde kiel niaj prauloj, ni serĉu novajn rimedojn; precipe ni celu eduki niajn idojn pli libere, en libera aero, en libereca atmosfero; ni forigu la kutimajn dogmojn el la vivo de niaj sekvantoj. Sufiĉe flua parolo, taŭgaj vortoj, ne ĉiam tre klare esprinitaj pensoj.

S-ro Wenger fermas la konkurson, kaj sciigas, ke morgaŭ matene ĉe la ferma solena kunsido de la Kongreso la premioj estos disdonataj al la konkurrintoj, kaj antaŭe la vic-prezidanto de l' ĵuĝistaro, S-ro Edmond Privat, la majstro de l' esperanta parolo, havigos al la ĉeestantoj novan ĝuon.

Entute la konkurso estis interesa kaj utila. Interesa, kvankam ne sufiĉe diversnaciaj geesperantistoj ĝin partoprenis; utila, tial ke rezultas el ĝi por ni instruo, nome, ke ni ĉiuj devas pli zorge atenti pri ĝusta kaj akcenta elparolado de nia lingvo. Ni insistas pri tio: konataj, eĉ famaj Esperantistoj ŝajnas de kelkaj jaroj flankasi tiun gravan punkton. Ĉu ne S-ro Privat elmetis tiun ideon, kiun ni opinias ĝusta, ke eble iam en pli malpli proksima estonto, la gramatikaj finiĝoj devos ankoraŭ malplilaŭtigi, precipe tiu de la ununombra nominativa substantivo? En skribaĵo (reciproke pli ĝuste en legajo), la finiĝo „o“ estas necesa por analizo; en parolado ĝi estas nur senutile peza. Ĉu ni, en Paris, havos plezuratan okazon fari komparon pri la progresoj de niaj oratoroj? Ni esperas. LUPO.

## Tra la kongreso

.. Dankadon de la kongresanaro meritas la sindonemaj gesamideanoj, kiuj de la mateno ĝis la vespero senlace laboris en la Akceptejo.

.. La dua parto de la *Kongresa Dokumentaro de UEA*, enhavanta la protokolon de la kunvenoj de UEA kaj la tekston de la diversaj paroladoj ĉe la festa malferma kunsido, aperos fine de septembro. Ĉiu kongresano povos ĝin ricevi senpage, sin turnante al la C. O. de UEA.

.. La IX<sup>a</sup> Kongreso nun disvastiĝas sur la tuta Oberland, kie ekskursas la plej granda parto de l'kongresanoj, kiujn ne ŝajnas allogi la oficialaj aŭ eĉ la nepublikaj kunvenoj.

.. Avizo al scienculoj kaj naturamantoj: Ekspozicio de Alpaj floroj, insektoj kaj rokaĵoj de Natursciencia Instituto Davos-Dorf, troviĝas en ĉambro 30 de la Universitato (sama etaĝo kie okazas la fakkunsidoj). Ĉiuj klarigoj estas esperantaj. Malfermita ĉiutage de la 10-a ĝis la 12-a kaj laŭeble antaŭ la fakkunsidoj.

.. Juristoj kunvenis kun edzinoj en la Kazino vendredon vespere antaŭ la balo por trinki kafon, kiel antaŭajn jarojn. Sabaton matene ili havis sian 2-an kunvenon en la Universitato, ĉambro 34; ili diskutis pri la civilstato de la societo en la diversaj landoj.

.. Vendredon vespere je la 8-a 1/2, Juristoj forgesante ĉiujn procesojn, kviete trinkis teon en la Kazino antaŭ la balo. Ili bonvolu senkulpiĝi nian Redakcion, ke hieraŭ ne aperis la noto pri ilia kunveno; sed estis vere troege da presotaĵoj.

.. Fotografajoj de la Kongreso estas aĉteblaj en la Kazino ĉe la vendejo de S-ino Farges (Lyon'a Esp. Oficejo) kaj ĉe la vendejo de S-ro Francke (Bern'a librejo).

.. De sabato vespere je la 6-a la Akceptejo estos fermita, ĉar la bonvolaj oficistoj estas senforte lacegaj. Ni kompatu ilin, kaj kore danku!

.. Multaj leteroj alvenis por multaj kongresanoj en la specialan poŝtoŝtacion de l' Kongreso, en la Kazino. La kongresanoj bonvolu urĝe ilin preni.

.. Tre detalaj priskribaj raportoj aperos en venontaj numeroj de „Esperanto“ pri la Teatra Presentado: „Patreco“ kaj „Ginevra“, kaj pri la populara prezentado de „Wilhelm Tell“ en Interlaken.

.. Al ĉiuj *furnalisto*j, *korrespondanto*j kaj *sendito*j de *gazeto*j. — Ĉiuj estas petataj konigi al la Redakcio de „Esperanto“, 10 rue de la Bourse, Genève, (aŭ ĝis sabato je la 6-a, leterkusto de l' Redakcio en la Akceptejo) la nomojn kaj la numerojn de l' ĵurnaloj naciaj, kiuj raportis favore, nefavore aŭ malfavore pri la IX<sup>a</sup> Kongreso. La listo aperos en „Esperanto“.

## Karavano de UEA tra Svisujo

Kiel ni ĝin hieraŭ konigis, Postkongresa Vojaĝo tra Svislando estas organizata sub aŭspicioj de UEA kaj sub direkto de S-ro L. Poncet, Del en Lyon. Jen ĝia programo:

*Lundon 1-a de septembro*: matene je la 8 h. el Bern, tra Thun, Spiez, Interlaken, lago de Brienz (per ŝipo), Brienz, Meiringen (tagmanĝo), intermonto Brünig (per dentradvagono), Sarnen, Alpnachstad, (per ŝipo ĝis:) Vitznau, (per dentradvagono ĝis:) je la 6 h. <sup>1</sup>/<sub>2</sub> al Rigi Kulm (sunsubiĝo, vespermanĝo, dormo).

*Mardon 2-an*: (sunleviĝo, matenmanĝo) matene je la 9 h. <sup>3</sup>/<sub>4</sub> el Rigi Kulm, tra Arth-Goldau, je la 12 h. al Luzern (tagmanĝo, vizito de la urbo, ĝardeno de l' glaciejoj, organa koncerto en la ĉefpreĝejo, vespermanĝo, kursalo, dormo).

*Merkredon 3-an*: (matenmanĝo) matene je la 7 h. <sup>1</sup>/<sub>2</sub> el Luzern (per ŝipo) al Tellsplatte, (piede 4 km aŭ laŭvole ŝipe) al Flüelen je la 12 h. (tagmanĝo), je la 2 h. <sup>3</sup>/<sub>4</sub> el Flüelen (per ŝipo) al Brunnen, (per dentradvagono) al Axenstein, je la 4 h. 50 el Brunnen (per ŝipo) al Luzern je la 6 h. <sup>3</sup>/<sub>4</sub> (vespermanĝo, dormo).

*Jaudon 4-an*: (matenmanĝo) matene je la 9 h. <sup>1</sup>/<sub>4</sub> el Luzern, je la 10 h. <sup>1</sup>/<sub>2</sub> al Zürich (vizito de la urbo, tagmanĝo, nacia historia muzeo), vespere je la 6 h. <sup>1</sup>/<sub>4</sub> el Zürich, je la 9 h. al Bern.

Oni povos aliĝi nur por la 2 aŭ la 3 unuaj tagoj, aŭ poste viziti Sankt-Gallen, Konstanz kaj la lagon (Bodensee), Schaffhausen, Basel kaj Neuchâtel, aŭ tra la tunelo Gotthard veturi al Italando. Nur Esperantianoj estos akceptataj. La kondukonto de la karavano restos ĉiutage de la 5 h. <sup>1</sup>/<sub>2</sub> ĝis la 6 h. <sup>1</sup>/<sub>2</sub> en la ĉambro 4 (1<sup>a</sup> etaĝo de la Kazino, malantaŭ la Vendejo) por doni informojn kaj ricevi aliĝojn.

*Noto*. — La aliĝoj estas akceptataj de S-ro Poncet ĝis sabato vespere je la 11-a; post la koncerto li havos tablon en la koridoro de la Kazino (unua etaĝo) inter la du grandaj ŝtuparoj.

## Tra la mondo

*Den Haag*. — Okazis internacia vegetarana Kongreso, en kiu Esperanto estis akceptita kiel uzebla lingvo. Estis du paroladoj en Esperanto de S-ro J. A. Gill (Tunbridge) pri „La du verdaj aferoj“ (spinacoj kaj Esperanto!) kaj de S-ino van der Vet-Dirksen pri „Kio devas aparteni al la tuta homaro.“

*Washington*. — La meksika ministro de l'eksteraj aferoj informas, ke la meksika registaro ne povas akcepti la usonan proponon pri retiriĝo de Generalo Huerta ĉe la prezidantbaloto.

*London*. — La sufragistinoj frapis ĉefministron Asquith.

*Hago*. — La Palaco de la Paco estis inaŭgurita. Paroladis S-roj Carnegie, la eksterlanda ministro de Nederlando. Fine de la ceremonio oni inaŭguris buston de Edvardo VII<sup>a</sup>.

*Londono*. — Internacia Kongreso de la transportlaboristoj malfermiĝis.

*Afsne* (Belgujo). — Sur la rivero Lys du motorboatoj koliziis; tri personoj dronis.

*Kopenhag*. — La internacia Kongreso de la kriminalistoj malfermiĝis.

*Bruxelles*. — La grandaj manovroj komenciĝis.

*Lazaranas* (Hispanujo). — Fiŝkaptista ŝipo pereis; ok personoj dronis.

## Ĝis revido!

Ĉe

la lumo tiu ĉi de kiu ni  
unue estas salutataj antaŭ  
popoloj, kiuj en profundo sub  
ni loĝas, peze do spirante en  
fumaĵo de la urboj — ni nun juru  
la juron de la nova interligo!  
„Ni estu unu nur frataro, nek  
disunuiĝu en danĝero iu!“  
„Ni volas esti liberuloj kiel  
prapatroj niaj kaj preferi morton  
ol vivi submetite en sklaveco!“  
„Ni fidu grandan Dion nek ni timu  
potencon homan!“

Nun foriru ĉi

el ni kviete al la hejmo sia!

(Ni serĉis indan konkludon al nia IX<sup>a</sup> Kongreso, kaj ni estus volintaj dediĉi al gastama urbo Bern kaj al alloga Svislando salutversajon. Tempo al ni, kiel al ĉiuj, mankis. Ni nur al vi petas, al vi ĉiuj, ke starante kaj levante tri fingrojn de dekstra mano, vi solene rediru la juron, kiu nin tiel korpreme emociis ĉe la prezentado de „Wilhelm Tell“ en Interlaken, kaj kiu tiel ĝuste konvenas al nia mondmovado. Tial ni represis ĉi supre la versojn el la bona tradukaĵo de nia München'a samideano, S-ro L. E. Meier. Kaj nun ni krii: „Vivu Svisujo, lando de libereco, lando de noblanimeco! Vivu la Svisa Respublika Federacio! Vivu!“)

## UNIVERSALA ESPERANTIA LIBREJO

(En la Kazino)

# Kongresa Teatraĵo GINEVRA

de

EDMOND PRIVAT

Prezo: Fr. 1. 25